# LA MALLARĜA VOJO

ORIENTIERUNG IM ZEITGESCHEHEN




# La spirita kaj la nespirita muziko

**Pleniĝu per la Spirito, parolante unu al alia per psalmoj kaj himnoj kaj kantoj spiritaj, kantante kaj psalmante en viaj koroj al la Sinjoro, dankante Dion, la Patron, ĉiam pro ĉio en la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo.** Efesanoj 5,19-20


8-a jarkolekto – N-ro 3 2016

## Enhavo


| | |
|---|---|
| Kara leganto | 3 |
| La oldulo k. kritiko de la Biblio | 4 |
| Savita el la kritiko de la Biblio | 5 |
| Muziko – spirita aŭ ne? | 12 |
| Novaj kantlibroj | 21 |
| Protestantismo ĉe la fino? | 31 |
| CGD-rportoj / kalendaro | 36 |
| Pri propraj aferoj | 42 |



Eldonisto:

**Christlicher Gemeinde-Dienst (CGD)**
Societo por subteni kristanajn agadojn k. komunumojn, Pforzheim e.V.
Emajlo: info@cgd-online.de
Hejmpaĝo: www.cgd-online.de

**Redaktoro** (redaktaj kontribuoj)**:**
Dr. Lothar Gassmann
Am Waldsaum 39
D-75175 Pforzheim
Tel. (AB) 07231-66529
Fax 07231-4244067
Emajlo: Logass1@t-online.de
Hejmpaĝo: www.L-Gassmann.de

Kompostaĵo k. fotoj: Lothar Gassmann
Titolpaĝa foto: König David, Jerusalem
Titolpaĝo: Werner Fürstberger
Presejo: Druckmaxx, Blekendorf
Esperantigis: Vinko Ošlak


Por la nome subskribitaj kontribuoj la ĉiamaj aŭtoroj portas respondecon pri enhavo. Ĉiuj kontribuoj en tiu ĉi kajero – se ne menciite alie – rajtas esti senŝanĝe kaj per indiko de la fonto esti kopiitaj, presitaj kaj tradukitaj en aliajn lingvojn. Ni petas specimenon al la redaktejo. Koran dankon.


**CGD-administra centralo**
(Kolportado, konfirmado):
Thomas Ebert, Alemannenstr. 5
D-75038 Oberderdingen
Tel. 07258-295452
Fax 07258-2953200
Emajlo: info@cgd-online.de

**Donackontoj**

***Germanio:***
Sparkasse Pforzheim-Calw
Christl. Gemeinde-Dienst Pforzheim
IBAN: DE89 6665 0085 0007 2389 67
BIC aŭ SWIFT: PZHSDE66

***Aŭstrio:***
Raiffeisenbank Leiblachtal
Christl. Gemeinde-Dienst Pforzheim
IBAN: AT07 3743 9000 0380 8045
BIC: RVVGAT2B439

***Svisujo:***
Die Schweizerische Post:
Christlicher Gemeinde-Dienst Pforzheim
Verein zur Förderung christlicher Werke und Gemeinden e.V.
DE-75175 Pforzheim
IBAN: CH32 0900 0000 6074 9747 5
BIC: POFICHBEXXX


La revuo LA MALLARĜA VOJO, aperanta en la diĝita formo, estas senpaga. La redaktejo tamen dankas al tiuj, kiuj pretas la eldonadon subteni per libervolaj monkontribuoj.
La CGD ĝuas statuson de la ĝenerale utila institucio. Libervolaj subtenoj estas ĝis 20 % de la jarenspezo imposte reduktebla. **Bonvolu menci-i, se donacante, vian poŝtkodon kaj vian „Freundesnummer“.** Vi trovas ĝin sur la adresslipo de la dorspaĝo. Adressfeld auf der Heft-Rückseite. Koran dankon.

# Karaj legantoj!

En la letero al la Efesanoj 5,19-20 oni legas: „*Pleniĝu per la Spirito, parolante unu al alia per psalmoj kaj himnoj kaj kantoj spiritaj, kantante kaj psalmante en viaj koroj al la Sinjoro, dankante Dion, la Patron, ĉiam pro ĉio en la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo.“*

Hodiaŭ en la kristanaj komunumoj oni multe diskutas pri la spirite konvena kaj malkonvena muziko. Kiamaniere distingiĝas la spirita kaj la nespirita inter si?

La spirita muziko (ekz. en kanto) gloras la triunuan Dion tiel per sia teksto, kiel ankaŭ per la melodio, ritmo kaj harmonio (komp. Psalmo 145-150). – La nespirita muziko gloras la aferojn de ĉi tiu mondo kaj la homon.

La spirita muziko emfazas senteme certan spiritan tekston kaj kovras ĝin ne per troa laŭtpotenco aŭ ia alia malkonvena aranĝo (komp. 1 Korintanoj 14,7-9). – La nespirita muziko kovras certan spiritan tekston, se tia tute troviĝas, kaj forkondukas de ĝia enhavo.

La spirita muziko konsistas el ekvilibra kuneco de melodio, harmonio kaj ritmo kaj tiel alparolas la homon en lia tuto el la spirit (teksto), animo (melodio kaj harmonio) kaj korpo (ritmo). Komparu: Efesanoj 5,19; Kolosanoj 3,16-17). – La nespirita muziko alparolas nur partan aspekton de la homo, pliparte la animon aŭ la korpon.

La spirita muziko neniam provas manipuli la homon, ekzemple ĵetante lin en trancon kaj ekstazon kaj elkomutante lian intelekton (komp. 1 Petro 5,8). – Sed la nespirita muziko provas atingi ĝuste tiun celon kaj – en la plej malbona kazo – sklavigi la homon sub la demonajn fortojn.

La spirita muziko stimulas la homon laŭdi Dion kaj penti kaj purigi sian koron (komp. 1 Korintanoj 6,18-20). – La nespirita muziko kondukas la homon al sia memo, avido kaj malpuro.

Enketu ni tre precize, kian specon de muziko ni aŭskultas en niaj komunumoj! Ĉu ni estas altirataj per tia muziko for de la vivanta, sankta Dio, returne en la mondon – aŭ ĝi kondukas nin al la pliprofundiĝanta, pli intima medito? Dio benu kaj gardu vin!

*Via Lothar Gassmann*

## *Pensoj de maljuna viro*

# La maljuna viro …

*kaj la kritiko pri la Biblio*

La Biblio estas la vorto de Dio al ni homoj. La Biblio estas altvalora trezoro. Ĝi informas nin pri la tempo kaj pri la eterno. Ĝi diras al ni, kio la volo de Dio estas. Ĝi raportas pri la komenco de la kreado kaj pri la fino de tiu ĉi mondo. Ĝi instrukcias nin pri la vivo kaj pri la morto. Pere de la Biblio ni scias, ke Dio neniam komencis ekzisti, ke Li ĉiam estis kaj poreterne estos. Ĝi atestas al ni pri nia perditeco kaj pri nia savo per Jesuo Kristo. La Biblio estas la spirito kaj la vivo. Ĝi estas la unuela vero. Neniu alia libro al ĝi egalas. La vorto de Dio estas kiel fajro, kiel martelo, kiu frakasas rokojn. La vorto de Dio estas la lumo por niaj piedoj kaj la lumo sur nia vojo. La ĉielo kaj la tero pereos, sed la vorto de Dio restas en eternoj.

La maljuna viro estas trista, se oni obĵetas, ke la vorto de Dio la vero estas. La maljuna viro bedaŭras, se oni asertas, ke la Biblio en niaj tagoj ne faras plu ligon por ĉiuj homoj. Tiajn asertojn la maljuna viro renkontas bedaŭrinde je ĉiu paŝo.

*„La Biblio ne diras, kion ĝi opinias, kaj ne opinias, kion ĝi diras.“ „La vorto de Dio ne rajtas esti same prenita kiel la literoj de la Biblio.” „La Biblio estas neklara, neniu povas definitive diri, kion ĝi volas.” „La tuta eksegezo de la Biblio estas relativa kaj kondiĉita per la tempo, ĉiam laŭ la kultura fono.” „La Biblio ne estas la vorto de Dio, ĝi la vorton de Dio enhavas.”*

La maljuna viro estas ĉagrenita, se la eraripovaj homoj sin prezentas kiel la juĝistoj super la vorto de Dio. Ili kritikas la Biblion. Ili vidas multon tute alie. Tiu ĉi sinteno estas nek nova nek moderna. La kritiko super la Biblio estas preskaŭ tiom malnova kiel la homaro. „Ĉu Dio vere diris?“ Jam ek de la unua peko al la esenco de la homoj apartenas kontraŭstari Dion. La homo kontraŭas la volon de Dio kaj malvidas Lian veron. La niatage kutima historia-kritika metodo de la biblia eksegezo permesas nenian konvenan aplikadon. Tiu, kiu proponas al ĝi sian etfingron, de tiu estas forprenita la tuta mano. Ĉi tie oni rajtas fari nenian kompromison. Iomete da fermento acidigas la tutan paston.

*Rolf Müller, Wilkau-Hasslau*

# Savita el la marĉo de la Biblikritiko

*Vivatesto de iama studentino de teologio*

<u>*Antaŭrimarko de la redaktoro:*</u> *Kara leganto, ĉu vi foje miras pri tio, kial en multaj eklezioj kaj liberaj komunumoj regas tioma malfido? Tio havas ligon kun la histori-kritika edukado de la teologoj. Precize la samon, kion s-ino Kupfermann priskribas, mi mem travivis dum mia teologia studado – kun unu nura diferenco, ke Dio havis kompaton kaj gardis mian fidon ankaŭ dum la studado en la bibli-kritika universitato. Se ĉi tie estas montrataj kelkaj aĉaj fruktoj de la biblikritiko, tiam nur, por doni al la veneno la adekvatan nomon, kiun oni en multaj klerigaj lokoj sentas kiel orgojlon de la falinta homa racio. Ĉiuj argumentoj de la bilikritiko povas esti facile objêtataj (rigardu ekzemple la literaturon fine de la artikolo!).*

Mia nomo estas Anita Kupfermann, kaj mi volas al vi raporti pri miaj spertoj, kiujn mi dum mia teologia studado akiris. Tiu ĉi malampleksa, tamen honesta vivbildo estu por vi tiel averto, kiel ankaŭ kuraĝigo. Avertante mi volas al vi rakonti, kiamaniere la tn. „historia-kritika pribiblia scienco“ negative influis mian kredrilaton al Dio kaj per tio mian tutan vivon. Kaj kuraĝigi volas mia rakonto per tio, ke mi en pleno de ĝojo kaj dankemo povas raporti, kiel la Sinjoro Jesuo Kristo ankoraŭ dum mia studtempo min sanigis de mia malfido kaj min vokis en sian mirindan postsekvon. Mi esperas kaj preĝas, ke la sankta Dio per tiuj ĉi tekstlinioj estu glorata kaj la homoj kuraĝigotaj, donaci al la vorto de Dio plenan konfidon.



### Mia pribiblia studtempo kaj la histori-kritika metodo

Per la edukado en mia gepatra domo mi jam frue estis konfrontita kun la enhavoj de la kristana kredo. Mi regule frekventis la porinfanajn diservojn kaj mi lasis min en mia 14-a jaraĝo bapti. Iom pli ol dek jarojn post tio mi dum agado kiel edukistino spertis fortan deziron por preni por mi sencohavan tempon sen profesia laboro. Mia deziro estis, dediĉi min al la vorto de Dio kaj pripensi mian kredovivon. Nome, kvankam mi min lasis bapti, mi rimarkis, ke la Biblio por mi estis io fremda kaj mankis al mi viva rilato kun Dio. Mi sopiris kreski en mia fido kaj mi volis lerni pli profunde kompreni, kion signifas, vivi kiel kristano.

Tiel mi decidis frekventi dekmonatan biblian lernejon. La antaŭ mi troviĝantaj monatoj, tia estis mia granda espero, devus min helpi progresi en mia kreda vivo. Jam tuj ĉe la komenco de mia biblia lernotempo mi estis konfrontita kun la biblia kritiko en la formo de la „historia-kritika metodo“ (HKM). Tiu metodo HKM estas la kutima labormaniero en la germanaj unniversitatoj resp. malmultaj liberekleziaj altlernejoj por klarigi la bibliajn tekstojn. La Biblio laŭ tiu metodo ne estas plu prenata kiel la de Dio inspirita Sankta Skribo, sed kiel en si kontradikcia kaj erarhava homa verko, kiun oni devas kiel ĉiun alian libron de la tutmonda literaturo, kritike pridemandi. Tiu maniero trakti la tekston de la Biblio kondukas pliparte al malhistoriigo. Tio signifas, ke la historia certeco de la bibliaj raportoj estas metitaj sub demandosignojn. Resume, la plej multaj aferoj, pri kiuj la Biblio raportas, laŭ tiu metodo neniam devus okazi.

Mi volas helpe de ekzemplo montri, kiamaniere tiu historia-kritika biblia esploro funkcias. La estiĝa tempo de la evangelio laŭ Marko estas supozita je la tempo ĉirkaŭ la jaro 70 p.Kr. respektive iomete pli poste, nome el sekva argumento: La kritika biblia esplorado ekskluzivas kategorie, ke Jesuo Kristo la estonton povis antaŭvidi. Tiu ĉi evangelio raportas tamen pri tio, ke Jesuo la detruon de la templo antaŭdiris. En la jaro 70 p.Kr. plenumiĝis la vortoj de Jesuo laŭlitere; la templo de Jerusalemo estis fare de la romanoj detruita. La pliparto de la kritikaj esploristoj havas starpunkton, ke ĉi tie temas pri falsa profetaĵo (*viticinum ex eventu*). Ili deiras de tio, ke la anonco pri la detruo de la templo estis metita en la buŝon de Jesuo nur post la evento, do post la jaro 70 p.Kr. Per tiu ĉi fiksita kaj malfida kompreno estas la tuta Sankta Skribo kritike prijuĝata, ĝis finfine ĉiuj ĝiaj raportoj staras sub la demandosigno.

Por povi pli bone kompreni, kio estas la rikolto de la moderna biblikiritika esplorado, mi volas kelkajn rezultojn diri pernome:

▪ Adam kaj Eva neniam ekzistis, ili laŭ tio estas nur literaturaj simboloj por la tuta homaro. Tiel ankaŭ la unua peko ne okazis.

▪ Noah kun sia arkeo tiel estas nur legendo kaj ne vera okazintaĵo.

▪ La 5 libroj Moseo ne venas de Moseo, sed de minimume tri skribistoj, kiuj dum longa tempo laboris sur tiu komponaĵo kaj eĉ inter si kontraŭdiras.

▪ La dek ordonoj ne estis ricevitaj de Dio, sed ili estiĝis tra longtempa kreska proceso (do multe pli poste ol Moseo vivis).

▪ La militoj por ekposedi landon, kiel ekz. la libro de Josuo tion priskribas, laŭ tio okazis neniam.

▪ La vortoj kaj la agoj de Jesuo en la evangelioj estis ofte elpensitaj de la pli postaj kristanoj kaj metitaj en la buŝon de Jesuo resp. atribuitaj al li. Multo do, pri kio la evangelioj raportas, estas laŭ tio la historia fikcio. Ekzemple Jesuo neniam ion diris pri sia morto, eĉ

malpli pri sia resurekto. Ankaŭ, ke li estas la Filo de Dio aŭ ke li estas Kristo, estis elpensita pli poste. Apud tio li neniam havis intencon fondi eklezion aŭ konverti paganojn.

▪ Paŭlo ne estas la skribisto de la novtestamentaj epistoloj al Kolosanoj kaj Efesanoj, de la 2-a epistolo al Tesalonikanoj kaj de la 1-a kaj 2-a epistoloj al Timoteo, same ne de la epistolo al Tito, kaj ankaŭ Petro ne skribis la epistolojn de Petro ktp.

Tio ĉi estas nur kelkaj el la sennombraj ekzemploj. La rezultoj de la historia-kritika metodo alpaŝi la Biblion ne estis al mi dum la biblia lernejo kaj aparte dum mia pli posta studado prezentitaj (por scii, ke tiaj vidpunktoj troviĝas), sed de miaj docentoj reprezentitaj kaj per konvinko instruitaj. Sub la influo de tiu instruo la aŭtenteco de la Biblio por mi fariĝis ĉiam pli dubinda. Ĉiam pli klara ŝajnis al mi la penso, ke la Biblio ne redonas nepre la neerareblan vorton de Dio, sed egalas al certa almanako de homaj kaj tiel erareblaj pensoj pri Dio kaj pri la mondo.

Post ĉiu persono kaj ĉiu evento en la Biblio nun estis metita dika demandosigno. Apud mia nova „rekono", ke la pli multaj bibliaj rakontoj tradicias neniun realan, tio estas historian situacion, ankaŭ miaj etikaj principoj tiamaniere estis submetitaj al pridemandoj. Ni interparolis en la biblia lernejo pri diversaj temoj (samseksismo, antaŭgeedzeca seksa rilato ktp.) kaj ni nin demandis, ĉu tiuj principoj tamen ne estas alpreneblaj sen pripenso. Resume dirite, mi pli kaj pli sentis, kiel pli kaj pli fortaj duboj super la kristana kredo kaj la Biblio ennestiĝas.

Unu demando speciale altrudiĝis al mi pli kaj pli: Se ĉio-ĉi fakte ne estas vero, kiel skribite, kion do mi ankoraŭ povas kredi? Mia skeptiko kontraŭ la kristana kredo kreskis eĉ speciale, kiam dum la instruhoroj aliaj religioj estis intensive pritraktataj. Mi falis en profundan kaj daŭran fidokrizon kaj serioze pripensis mian kristanan kredon forĵeti. Miaj instruistoj pri la Biblio estis en si tiel certaj, ke por mi povus esti nur bone, se mi mian malnovan kredfundamenton pripensu kaj malkonstruu, por tiel akiri la novan „trapensitan, maturan kaj plenkreskecan fidon". Tio estis iliaj pozitivaj perspektivvidoj por mia vivo, kaj mi intime esperis, ke ili estas en pravo.

## Mia tempo en la seminario teologia

Post la fino de dek monatoj mi unue revenis por unu jaro al mia malnova profesio. Tamen en miaj pensoj mi ludis per ideo lerni plu. Kaj ĉar min daŭre okupis la nerespondita demandoj pri la biblia kritiko, estis por mi proksima la ideo, komenci teologian studadon. Apud tio plaĉis al mi forte la penso, fariĝi pastorino, tiel mi komencis en la jaro 2007 mian studadon de la teologio en la Faka Altlernejo de la Ligo de la evangeliaj libereklezioj.

Vokitecon de Dio mi tamen ne ĝisvivis, kvankam mi provis tion subparoli al mi. Mi parolis kun multaj homoj pri miaj pensoj, sed ne kun Dio mem. Intertempe mi defendis min kontraŭ la biblikritika pensmaniero, ja kelkaj rezultoj de la historia-kritika esplorado estis al mi ankoraŭ el la tempo de mia biblia lernejo konata. La biblian kritikon mi dum la studado alprenis tamen en ĉiam pli granda amplekso. Mi rememoras, kiel ekzemple certa docento forlasis la prelegĉambron kaj ene de la pordokadro diris: „Morgaŭ ni mortigos Moseon.“ Per tio li opiniis, ke ni sekvan tagon ekscios, ke Moseo, kiel priskribita en la Biblio, historie tamen ne ekzistis.

Aldone mi lernis, ke multaj malnovtestamentaj rakontoj estas mitoj kaj legendoj, kiuj neniel rilatas kun la historia realo, kaj ke la juda adorado de Dio (templo, diservo, religiaj festotagoj, ordonoj ktp.) pliparte estis kopiita de la religia ĉirkaŭo de Israelo. La bibliaj tekstoj tiamaniere estis kompletigitaj dum multaj jarcentoj de multaj nekonataj skribistoj, ŝanĝitaj kaj modifitaj kaj intence manipulitaj. Tial ankaŭ multaj kontraŭdiroj (tensioj) en la Biblio. La biblia kritiko akiras validon, se oni ĝin allasas, certan memdinamikon kaj ĝi kiel lavango superŝutas ĉian kredenhavon, ĝis fine ĉiu speco de la kredcerteco estas for.

Mi aŭdis multajn studentojn diri, ke ili tiujn rekonojn de la „scienco“ trovis kiel riĉigon – ankaŭ mi tiam tiel perceptis respektive min persvadis, ke tio tiel estas. En realo tamen mi rikoltis nun la amarajn fruktojn de mia nova, „plenkreska“ kredo: Proksime al la fino de la dua semestro mi decidis tute konscie, la Biblion kiel plene malaŭtentan dokumenton meti flanken, kaj mi aranĝis ĝin en la plej suba tirkesto de mia ŝranko, por ĝin elpeli el mia vidhorizonto. Mi havis nenian bezonon plu en ĝi legi, por ne diri laŭ ĝiaj eldiroj vivi. Mi ne preĝis plu kaj mi ellasis ankaŭ laŭ iu ajn formo peti por saĝo kaj helpo. Mi estis multe tro sekura en mia kritika sinteno.

Kvankam mi interne de mi ne havis plu ian ajn ligon al Dio aŭ al lia vorto, mi porekstere min tamen daŭre montris kiel estonta pastorino; mi predikis kaj mi simulis piecon, almenaŭ en la komunumo. Inter miaj kamaradoj mi tamen min ne bremsis; mi drinkis ĉiam denove dum niaj distrokunvenoj kaj mi perdis mian hontosenton antaŭ mensogi kaj trompi. Aparte, klaĉi pri aliaj kamaradoj, tio preparis por mi ĉiam pli grandan ĝojon. Ĉe tio en miaj okuloj ĝuste tiuj junaj viroj estis dornoj, kiuj al la Sankta Skribo dediĉis sian senliman fidon. Troviĝis eta rondo en mia semestro, kiu ankaŭ dum la instruhoroj pledis por la aŭtenteco de la Biblio. Min kaj miajn kamaradojn ĝenis tio nekredeble forte, pro kio ni pri ili senĉese malice klaĉis. Ĉe ĉio-ĉi mi sentis nek plej teneran ĝermon de ia riproĉa konscienco. Jam delonge mi perdis respekton antaŭ Dio aŭ almenaŭ timon antaŭ puno. La avertaj vortoj de la Skribo vekis en mi indiferenton.

La Dio, kiun mi dum mia studado rekonis, ne koleras, Li estimas ĉian dubon kaj pardonas finfine al ĉiuj homoj. Kial do mi tiel timu? Kial ne havi distron kaj ne konsumi la vivon en plenaj glutoj tiel, kiel mi tion volas? Rigarde tiun elirpunkton mi vivis sen la celorientiĝo, ĝis la komenca eŭforio falis kaj mi per la tempo fartis pli kaj pli malbone. Tiel mi fine perdis plankon sub miaj piedoj. Interna malpleno montris al mi klare, ke al mi la vera vivo kaj la vera kvieto mankas. En la biblikritikaj libroj kaj interparoloj kun miaj kunhomoj mi serĉis por trovi tion, kion mi ne posedis – tamen vane.

En tiu tempo mi konfidis min okaze de komunuma aranĝo al iu fremda evangeliisto kaj petis por lia porpeto. Mi sopiris havi veran rilaton kun Dio, sed eĉ por tio peti estis por mi neeble. Mi sentis, kvazaŭ mi estus perdinta ĉian kapablon de preĝo.

**Ŝanĝo en mia vivo**

Kelkajn monatojn pli poste evidente estis plenumita la porpeto de tiu evangeliisto. La 6-an Decembron 2008 la Sinjoro malfermis miajn okulojn, kaj mi rekonis mian grandan kulpon kaj same mian sendian vivon.

La decida punkto por tion envidi estis publika polemika parolado de iu el niaj docentoj en la seminario, kiu en la kadro de iu kinovespero estis parolita. La parolado primokis antaŭ ĉio tiujn, kiuj en la Biblion kredis laŭvorte. Unu el la primokitoj, kiu ankaŭ ĉeestis mian seminarion, sidis rekte antaŭ mi kaj lasis la vortojn super si pasi. Post la aranĝo mi lin alparolis pri tio kaj li certigis al mi, ke li pro sia fido ne hontas. Lia interna kvieto kaj lia kredcerteco igis min pripensi. Mi min ankaŭ demandis, kiamaniere la ceteraj primokitaj „biblifidelaj“, kiuj ofte simple estis nomitaj „fundis“ (fundamentalaĉuloj) estus reagantaj. Je mia granda miro ili ne lasis sin movi al la ideo de bojkoto de instruhoroj. Anstataŭ tio ili venis kiel ili kutimis veni ĉiun tagon, al la komuna preĝo kaj preĝis ankaŭ por la primokinto kaj por la tuta seminario.

Mi rekonis, ke la Sinjoro estas ilia defendoŝildo kaj ke ili posedas firman fidon. En la Biblio staras skribite, ke kristanoj ne vivas plu por si mem, sed por tiu, kiu por ili mortis. Ĉe tiuj junaj viroj el mia seminario mi povis rekoni, ke ili helpe de la graco Dia estis kapabligitaj, ne defendi sian propran rajton kaj renomon. Tion mi trovis en la situacio tiam kiel „nenormala“ kaj tre impresiva. Ili povis siajn humiliĝojn deponi ĉe Kristo, kaj tiel la kolero kaj venĝo ne ricevis lokon por si.

Post ĉiuj tiuj eventoj kaj impresoj, kiuj min ne lasis plu el sia povo, dum la kristnaskaj ferioj mi verutis hejmen al mia familio kaj tie pli kaj pli rekonis, ke mi

Dion per mia biblikritika vivsinteno malrespektis. Mi negis la vorton de Dio, mi malestimis la gracon de Dio kaj la servistojn de Dio mi primokis. Antaŭ ĉio tamen la fakto, ke mi min nomis kristanino kaj tamen samtempe ne estimis la propekan oferon de Kristo, mi rekonis mian nekredeble pezan eraron. En tiuj tagoj mi sub larmoj multe pentis, mi serĉis Dion en preĝo kaj mi rajtis sperti lian pardonon. Kun ĝoja koro mi aĉetis por mi novan Biblion kaj komencis en ĝi diligente legi – ĝis la hodiaŭa tago mi ne ĉesis tion fari kun plena ĝojo. Mi vokis la nomon de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj mi humiligis min antaŭ li. Mi konfidis al Kristo mian vivon kaj parolis al li, ke mi de nun en lian vorton kredas – egale, kiom da demandoj min povus ankoraŭ renkonti.

Mi ne havas respondon por ĉio, tamen mi nun kun plena koro havas certecon, ke la Sankta Skribo estas inspirita de Dio, kaj ke la Biblio en si estas en akordo kaj sen eraroj en tio, kion ĝi instruas. Mi dankas la Sinjoron, mian Dion, kun plena koro por lia suverena graco super mia vivo, kiel ankaŭ por la rekono de miaj pekoj kaj por lia pardono de ili, kiun li al mi donacis. Dio mian vivon riĉe pridonacis kaj mi rajtas fidi pere de lia graco, ke lia vorto estas la perfekta vero (Johano 17,17). Estas tiel bele, simple kiel infano povi fidi, kaj mi formetas hodiaŭ ĉiujn dubojn kaj „sciencajn rekonojn” flanken, kiuj kritikas la aŭtenton de la Biblio. Anstataŭ tio mi trovas en Kristo, kiel lin la Skribo revelacias, ĉiujn trezoraĵojn de la saĝo kaj de la rekono.

Dediĉu ni do al nia Sinjoro kaj Savanto nian fidon; mi estas certa, ke li tion benos. Mi preĝas al la Sinjoro, ke vi restu gardataj antaŭ la malfido kaj ke via fido al Dio kaj lia vorto estu firmigata.

**Rimarkoj**

Rilate la pli elĉerpajn informojn mi rekomendas sekvajn librojn de prof-ino d-rino de teologio Eta Linnemann, kiu kiel la iama disĉiplo de Bultmann kaj historia-kritika teologia profesorino per sia progresinta aĝo konvertiĝis kaj per 60 jaroj ankoraŭ foriris al misia laboro. Ŝi mortis en la jaro 2009. Kelkajn tagojn antaŭ ŝia morto mi havis grandan ĝojon, ke mi povis pli longe kun ŝi telefoni. Kune ni ĝojis soper nia grandeca Savanto. Li estas inda – inda je fido. Kaj nun ĉi tie la informeroj pri tri libroj de tiu ĉi aŭtorino:

- *Original oder Fälschung. Historisch-kritische Theologie im Licht der Bibel*, Bielefeld: CLV, 2010, 4. Auflage
- *Die Bibel oder die Bibelkritik?*, Nürnberg: VTR, 2007
- *Bibelkritik auf dem Prüfstand*, Nürnberg: VTR, 1999, 2. Auflage

Kontakto: an.kupfermann@googlemail.com

Ses bazaj prelegoj (ne predikoj!) de **Prof-o D-ro teol. Eta Linnemann** (1926-2009), kiujn ŝi prezentis 2003 post nia invito al la tiama biblia seminario en Bad Wildbad hielt. Ili estas registritaj sur 1 MP3-CD sub la titolo **„KRITIK DER BIBELKRITIK“** kaj oni povas ilin akiri ĉe la sekretariejo de „Der schmale Weg“ (longeco ca. 6 horoj, 9,80 eŭroj plus sendokosto).

La temoj titolas:
Von der Bibelkritikerin zum Kind Gottes
Bibelkritik - Wissenschaft
oder Manipulation?
Gibt es ein synoptisches Problem?
Gibt es Pseudepigraphen?
Wer schrieb den Hebräerbrief?
Das falsche Fundament
der historisch-kritischen Methode



# La spirita kaj la nespirita muziko

*Elplume de kantoro kaj docento en la alta muziklernejo a.D.* ***Adolf Graul****, Gunningen*

*Red. atentigo: Tiu ĉi teksto ne estas simple legebla, sed se iu investas penon, ĝin funde trastudi, tiu gajnos spiritan profiton en riĉo.*

Surbaze de pluraj opiniaj diferencoj pri la uzo de la moda populara muziko por spiritaj celoj en la kristanaj komunumoj troviĝis en pasintaj jaroj jam doloraj splitiĝoj de unuopaj komunumoj. La ĉi tie prezentata pritrakto tiel devus la manierojn de efikado de la moderna populara muziko kaj ĝiajn stilecajn karakterizojn koncerne la utiligeblecon por la kristanaj komunumoj kaj iliaj spiritaj celoj surbaze de la bibliaj kaj empiriaj sciencaj esploroj kaj iliaj rezultoj montri laŭ la objektivaj kriterioj.

## Muziko en la komunumo de Kristo origine estis orientita pure laŭ la vorto

Ek de kiam troviĝas kristanaj komunumoj, troviĝas ankaŭ formoj de adorado al Dio en tiuj komunumoj. La evoluo de la kristanaj esprimformoj de adorado al Dio origine estis *orientita pure laŭ la vorto*. La plia evoluo iris de la parolitaj preĝoj al la poeziaj lingvaj formoj, kiel ili estas por ni tradiciitaj ekzemple en la psalmoj. Tie jam evoluis aparta formo de la juda vortdeklamado ene de la tn. *“Parallelismus membrorum”*, kiel poezie emfazita esprimkvalito de la teksta eldiraĵo. Helpe de la voĉa levado de la lingvaĵo evoluis finfine – cetagrade kun tonala nobligo – la liturgiaj kantformoj kaj la spiritaj kantoj, kiuj tamen daŭre *servis* kiel la esprime plifortigitaj artaj rimedoj por emocia pliprofundigo de la spiritaj tekstaj diraĵoj. La muzikhistoria plia evoluo de la memstaraj muzikaj formoj kondukis dum jarcentoj fine al pli granda kolekto de la ekleziaj muzikaj formoj de komponado, kiel oni ilin konas el la ampleksa tradicia eklezia muziko, ĝis la stila plurfaceto de ĉiuj ceteraj muzikaj formoj de nia jarcento.



Se oni la tutan plenon de la muzikaj komponaĵoj, inkluzive ĉiujn plej modernajn stildirektojn, kiuj nuntempe estas utiligataj por adori Dion en la kristanaj ko-

munumoj, prijuĝas laŭ la kriterioj, kiujn Dio mem per sia vorto al ni mesaĝas, tiam oni baldaŭ povos konstati, ke tre multaj komponaĵoj, kiuj nuntempe sonas en la kristanaj kunvenoj, neniukaze kongruas kun la bibliaj kriterioj, kiuj en la korespondaj eldiraĵoj estas al ni mesaĝitaj per la Sankta Skribo.

**Ĉu muziko povas servi al la spiritaj celoj de la kristanaj komunumoj?**

Kiamaniere do estu komponita la adora muziko, por ke ĝi konvenu al la imago de nia Sinjoro kaj same povu esti en la servo al la spirita kresko de lia komunumo? Ĉu tute povas la muzika konstruaĵo servi al la adorado de nia Sinjoro? Ĉu ne estus plie laŭ la senco de la celo, se oni la formojn de la adorado reduktu je lingvaj vortformulaĵoj, por ne eniri la danĝeron, per la muzikaj strukturoj, kiujn oni aldonas al la tekstoj, la aŭskultanton nur misgvidi for de la spirita vorta mesaĝo? Multaj muzikaj verkoj, kiel konate, havas ankaŭ sorĉan efikon kaj povas la aŭskultantojn jam nur per la potenco de la muzika elradiado tiel kapti, ke la vera mesaĝo per vortoj, al kiu oni devus servi, elpuŝiĝas en malantaŭon kaj la aŭskultanto povas esti ĉirkaŭita de la nebulo.

Kompreneble ni havas el la perado de la tradicia eklezia muziko tre multajn bone sukcesintajn korusajn verkojn, oratoriojn, kantatojn kaj elstare bonajn kantojn, kiuj per sia spirita direkto vere korespondas ankaŭ kun la kriterioj bibliaj. En la evangeliaj liberaj eklezioj tamen oni tre malofte aŭdas ion el tiu riĉa oferto de la vorte orientita eklezio ekz. de Heinrich Schütz, Melchior Franck aŭ Johann Sebastian Bach, kies korala verko jam mem prezentas oran minejon por la korusoj en la komunumoj, kiuj tendencas havi spirite direktitan adormuzikon. Tamen en la psalmo 98 la kristanoj estas finfine vokitaj ankaŭ por kanti novajn kantojn kaj tiel apud la elprovitaj kantoj ankaŭ la nove komponitaj el nia tempo estas atendataj.

Por la nuntempa praktiko en la komunumoj estas sub la aspekto de la tiel granda oferto de novaj kantoj grave, laŭ kiuj kriterioj estu decidita konvena elekto. Multaj komplete konvenaj tekstoj estas nuntempe envolvitaj en tre diversaj muzikaj stilmanieroj, kiuj probable utiligas ankaŭ la profanan mondecan muzikan stilrimedon de la danca kaj distra muziko, diskoteka, populara kaj eĉ teknologia muziko. Por la tn. „kristana rok-en-rola muziko” estas eĉ konsekvence utiligataj tiuj ĉi mondecaj stilelementoj, kaj tiel krom la teksto ne plu troviĝas diferenco kompare kun la rok-en-rola muziko.

La utiligo de la mondecaj stilrimedoj estas plikaze argumentita per tio, ke oni sub bona misia intenco opinias devi al la malproksime starantaj mondecaj homoj

la biblian mesaĝon de la evangelio, peri per certa muziko embalaĝo laŭ ilia gusto, por ke la biblia teksta enhavo ankaŭ por tiuj homoj aperu alloga. Al tio aldoniĝas ankoraŭ la fakto, ke la larĝaj tavoloj de nia junularo per la daŭra aŭdado de tiuj ĉi stilvariantoj ne nur en diskotekoj, sed aparte en la publikaj komunikiloj de radio kaj televido ĝis la modernaj portantoj de la tona registrado, jam estas tiel forte kondiĉigitaj por la specifaj karakterizaĵoj de la populara kaj diskoteka muziko, ke la muzika subtilo por la naturkonforma muzika ritmo laŭ la modelo de la organikaj movprocesoj (kongrue kun la kora pulsado, sangopulsado kaj spirado) pli kaj pli degeneras.

Eĉ la pesbiteroj en la komunumoj mem en gvidaj pozicioj reprezentas la opinion, ke ĉiaspeca muziko povas esti utiligata koncerne ĝian uzeblecon en la kristanaj komunumoj kaj por iliaj spiritaj celoj. Finfine temas nur pri la demando de la muzika gusto kaj de la muzika antaŭeduko de unuopaj aŭskultantoj, ja la muziko per si mem estas etike neŭtrala. Tiuj kontraŭdiroj rilate „por” kaj „kontraŭ” la „kristana rok-en-rola kaj populara muziko” ĉiam denove incitas animojn de multaj kristanoj. Kompreneble troviĝas ankaŭ publikaj komentoj tiel por defendi kej rekomendi la rok-en-rolan kaj popularan muzikon por la kristanoj, kiel ankaŭ la kritikaj voĉoj kontraŭ la utiligo de tiuj ĉi modernaj stilvariantoj de la moda populara muziko.

### Avertaj voĉoj kontraŭ la utiligado de la rok-en-rola kaj populara muziko

La spertoriĉa evangeliisto kaj anima prizorganto Heinrich Kemner skribas pri siaj spertoj kun la moderna rok-en-rola kaj populara muziko okaze de evangelizadoj:

*„Se ni la envangelian spacon de niaj tagoj superrigardas, do aperas ekzamenado de diversaj muzikaj eblecoj kiel nepra. Eĉ pli ol nuntempe estis antaŭ jaroj certa psikodela muziko ankaŭ por la anoncado vera provoko. Kun multe da bruego kaj ofte sub nekredebla hasto oni provis tiel influi per diversaj muzikaj manieroj la evangelizan terenon, ke la juna homo estis influita. Mi mem travivis evangelizadojn, dum kiuj iu muzika teamo kun neimagebla bruega kuliso haste martelis super la junularon. Mi persone povis tiun muzikon trasuferi nur preĝante kaj ofte estis en danĝero, perdi la malfermon de mia alparolo, aŭ ankoraŭ pli en danĝero, perdi la esencon de la anoncado pro la muzika impreso.*

*Eĉ se povas esti fakto, ke certa teama muziko unue alparolas la naturan sopiron kaj esperon de la homoj, kaj eventuale ankaŭ vekas senperecon en la aŭdoĝuo, tamen same estas vero, ke oni devas la limojn de tia muziko precize koni kaj ilin observi. Tia muziko sendube povas iĝi ankaŭ danĝera. Post mia alparolo, ĉiuokaze dum miaj servoj, mi ĉiam tian muzikon malaprobis, ĉar montriĝis, ke ĝi fermis la vokon por la ani-*

*ma prizorgo. Junaj homoj atestis al mi, ke ili sub la influo de tiu muziko sian konvertiĝon prokrastis. Tiel ilia profito estis perdita.*

*En niaj rehabilitaj centroj ni havas la plej bonan korektadon fare de la junaj homoj, kiuj sub tiu muziko serĉis sian revlandon kaj dezerton trovis. Al mi ŝajnas ofte, ke tiuj junaj homoj, se ili resaniĝas, povas al ni diri la neimageblan klarecon de tiu danĝerlimo. Ili tuj sentas, kiam la tamburo de la malamiko kunaŭdiĝas. Kiam ni antaŭ jaroj faris provon, junularan grupon, kiu falis en la altiran forton de la pekoj, per tiu muziko delogi, estis karakterize, ke iu juna viro, kiu sin orientis al tiu ĉi mondo, al ni riproĉis, ke ni volas nin adapti al ili laŭ malaŭtenta maniero. Ni devis antaŭ la argumento cedi kaj rekoni, kiel akran orelon la mondo ĉirkaŭ ni havas por la limoj de nia vereco rilate la muzikon. Pro tio estas nepre, ke ni havu ĉe ĉiuj niaj junularaj evangelizadoj precizan konscion, ke muziko, kiu baras la plenon de la anoncado aŭ eĉ ĝin malebligas, por ni ne estas tolerebla.“* (El la bulteno Bundesblatt des Evangelischen Sängerbundes Julio-Sept. 76).

**La problemo pri la utiligo de la mondeca populara muziko en la komunumo**

Nia nuntempa populara muziko estas antaŭ ĉio emocia, influita de la mondeca tempospirito kaj ĝiaj modaj aperaĵoj, kiujn oni ne povas apliki sur la spiritaj mesaĝoj.

Bedaŭrinde oni nuntempe ankaŭ forgesas, ke pluraj historiaj ekzemploj (ekz. la elekto de melodioj ĉe Lutero) estis la *plene pripensita elekto* de *certaj* popolmelodioj, kie la tektona konstruo de la melodistrukturoj kun *konvenaj* emociaj esprimkvalitoj permesis novan kuniĝon kun la spiritaj tekstoj. Apud tio *en tiu tempo ankoraŭ ne troviĝis la profunda diferenco inter la stilaj variantoj, inter kiaj oni nuntempe devas distingi inter*:

1. *la tiel nomata D-muziko (distra muziko), danca kaj diskoteka muziko kaj;*
2. *la tiel nomata S-muziko (serioza arta kaj koncerta muziko), do la kampo de la klasika muzika literature;*
3. *la tradicia popolmuziko.*

La muziko ĉiam havas sian efikon. Tamen oni povas konstati, ke la maniero efiki povas esti tre diferenca. Oni distingas esence inter tri manieroj percepti la muzikon, kiuj, nature, troviĝas ankaŭ en miksitaj formoj:

1. la motor-refleksiva aŭdmaniero, kiu aparte forte reagas al la pliparte motore karakterizaj muzikstrukturoj, kiel ekzemple okazas ĉe la rok-en-rola kaj aparte eĉ teknikeca muziko.

2. la struktureca aŭdmaniero, ĉe kiu antaŭ ĉio estas ĝuata la ekstera artista formkonstruo de la kompozicio.

3. la emocia-asociada perceptmaniero, kie aparte la sentoj estas movataj, kaj ili ofte povas ligiĝi kun situaciaj rememoroj. Tio lasta okazas ekzemple ankaŭ ĉe la muzikstrukturoj, kies uzataj stilelementoj ĉe la diskotekaj aranĝoj estas uzataj kaj tiel okaze de uzado ĉe la kristanaj aranĝoj nature ĉiam asociigadas pri la mondeca diskoteka vivkampo.

### Kiujn vivsintenojn kaj konsciajn situaciojn Dio ĉe ni atendas?

Observu ni koncerne tion kelkajn postulojn de Dio, el kiuj eliras, kiamaniere Li deziras la internan sintenon de la homoj rilate al Li. Li promesas beni ĉiujn homojn, kiuj en rilato al Li alprenas la ĝustan internan sintenon kaj ĝin disvastigas. Ni ne forgesu, ke finfine ne *ni* estas tiuj, kiuj povas distribui al ni kaj al niaj kunhomoj vere *spiritan* benon. Ni ĉiam dependas de la efikado fare de Dio per Lia Sankta Spirito. Nur sub la gvidado de la Spirito de Dio ni, kiel konate, estas kapablaj, Lian vorton tute ĝuste kompreni (1 Kor 2,10-14). *Ekzamenu ni do, ĉu la muziko, utiligata en niaj komunumoj, kaj la kantoj, elradias tian sentsintenon, kian la aŭskultantoj povas akordigi kun la vivsinteno, kiu al la deziroj kaj imagoj de Dio respondas*.

La sekvaj bibliaj versikloj ekzemple klare diras, kiujn bazajn etosojn de nia vivsinteno Dio de ni atendas:

1.) *Postulo de sobreco kaj atento.*

En kontraŭdiro kun tiuj ĉi diecaj atendoj ofte la muzikstrukturoj el la psikodele efikantaj popularmizikaj stilmanieroj ĝis la trance stimulantaj ripetadstrukturoj de la teknikecaj muzikstiloj estas kunigataj kun la kristanaj anonctekstoj kaj tiamaniere estas malhelpata la estimo de sekvaj ordonoj:

*Marko 13,37: „Kion mi diras, tion mi diras al ĉiuj: Gardu vin!"*

*Mateo 26, 41: „Gardu kaj preĝu, por ke vi ne falu en tenton! La spirito estas bonvola, sed la karno estas malforta."*

*Luko 21,36: „Tiel nun estu viglaj tuttempe kaj preĝu, por povi fariĝi inda eskapi ĉion tion, kio devas okazi, kaj por stari antaŭ la Filo de la homo."*

*1 Tes 5,6: „Tial ni ne dormu, kiel la ceteraj, sed ni viglu kaj estu sobraj."*

*1Tes 5,8: „Sed ĉar ni estas el la tago, ni estu sobraj."*

*2 Timoteo 2,26: „... kaj por ke ili sobraj eliĝu el la kaptilo de la diablo, kaptite de li por plenumi lian volon."*

2.) *Malakcepto de ĉiuj sentaj tendencoj por la diboĉaj proponoj de la kontraŭbiblie orientita mondo.*

Kvankam la tipaj esprimelementoj de la moda populara muziko konforme al ĝia origina utiligo servas al la stimulado de la mondecaj distriĝoj kaj elradias emocie iliajn vivsintenojn, oni tamen ĝin ofte utiligas en la kristanaj komunumoj en kontraŭdiro kun la sekvaj instrukcioj:

*Tito 2, 11 k 12: „Ĉar jam aperis la graco de Dio, portante savon al ĉiuj homoj, instruante nin, ke foriginte malpiecon kaj laŭmondajn dezirojn, ni vivadu sobre, juste kaj pie en la nuna mondo."*

*Romanoj 12,2: „Kaj ne konformiĝu al ĉi tiu mondo; sed aliformiĝu per renovigado de via menso, por ke vi provu, kio estas la bona kaj aprobinda kaj perfekta volo de Dio."*

*1 Joh 2,15-17: „Ne amu la mondon, nek la mondaĵojn. Se iu amas la mondon, la amo al la Patro ne estas en li. Ĉar ĉio, kio estas en la mondo, la dezirego de la karno kaj la dezirego de la okuloj kaj la fiereco de vivo, estas ne de la Patro, sed de la mondo. Kaj forpasas la mondo kaj ĝia dezirego; sed la plenumanto de la volo de Dio restas por eterne."*

3.) La dezirataj vivsintenoj konforme al la sekvaj bibliaj versikloj surbaze de la ĝenerala efikkarakterizo de la rokaj kaj popularaj muzikaj stilvariantoj ne estas subtenataj, sed elpuŝataj.

*Kolosanoj 3,12: „Surmetu do, kiel elektitoj de Dio, sanktaj kaj amataj, koron de kompato, bonkorecon, humilecon, mildecon, toleremecon."*

*Psalmo 118,21: „Mi dankas Vin, ĉar Vi aŭskultis min kaj fariĝis mia savo."*

*Psalmo 119,67: „Antaŭ ol mi suferis, mi erarvagis, sed nun mi observas Vian vorton."*

*Filipanoj 2,3: „Nenion farante malpace aŭ arogante, sed kun humileco rigardante unu la alian kiel pli indan ol li mem.“*

*1 Petro 5,5: „Tiel same, vi plijunuloj, submetu vin al la pliaĝuloj. Tial ankaŭ vi ĉiuj submetu vin unu al la alia, kaj zonu vin per humileco; ĉar Dio kontraŭstaras al la fieruloj, sed al la humiluloj donas gracon.“*

*Psalmo 37,7: „Silentu antaŭ la Eternulo kaj esperu al Li. “*

*Psalmo 34,9: „Timu la Eternulon, Liaj sanktuloj; ĉar nenio mankas al tiuj, kiuj Lin timas.“*

*Zeĥarja 2, 13: „Ĉiu karno silentu antaŭ la Eternulo, ĉar Li leviĝis el Sia sankta loĝejo!“*

*1 Tesalonikanoj 4, 11: „Kaj ke vi celu esti kvietaj!*

En la ĉeesto de la ĝenerale kutima akustika kuliso de la rok-en-rolaj muzikstilaj variantoj povas por la komunumo jam nur sekve de la tro laŭtaj malkompataj kaj daŭre kondukantaj batsinsekvoj de la tampuroj kaj bruegaj basgitaroj estas neeble alpreni la supre rekomenditajn mensajn sintenojn.

Per la prefere korpaj stimuloj, kiajn tia *beat*-muzikstilo efektivigas, ankaŭ por la komunumo fariĝos tre malfacile, alpreni la biblie konforman preĝsintenon kaj direkti sin laŭ la sekvaj instrukcioj:

4.) *La sanktigado:*

*2 Korintanoj 7,1: „Havante do ĉi tiujn promesojn, amataj, ni purigu nin de ĉia malpureco karna kaj spirita, perfektigante sanktecon en la timo al Dio.“*

*Galatoj 5, 16: „Sed mi diras: Iradu laŭ la Spirito, kaj la deziregon de la karno vi ne plenumos.“*

*Efesanoj 5,9. „Iru kiel infanoj de lumo en la Sinjoro, iru kiel infanoj de lumo.“*

5.) *La korinklino:*

*Psalmo 34, 18: „Proksima estas la Eternulo al tiuj, kies koro estas rompita.“*

*Psalmo 51,17: „Oferdonoj al Dio estas spirit suferanta; koron suferantan kaj humilan Vi, ho Dio, ne malŝatas.“*

*Sentencoj 4,23: „Pli ol ĉion gardatan, gardu vian koron; ĉar el ĝi estas la vivo.“*

La porparolantoj de la kristana rok-en-rola muziko pledas sian preferon por tiu muzikstilo ofte per la argumento: *Dio finfine estus juĝanta nur la pozicion de la koro ĉe la partoprenantaj kristanoj kaj aŭskultantoj de la rok-en-rola muziko*. Sed ĝuste surbaze de tiu ĉi argumentado oni devus la utiligon de la rok-en-rola muzikstilo por la kristanaj celoj, se honestaj, malakcepti, ja la tipaj efikoj de la rok-en-rola muziko ĝuste metas en movon kontraŭajn vivsentojn ĉe la aŭskultantoj, ke tiel la korsinteno konsidere la supre menciitajn dezirojn de Dio, ne realiĝas.

## La korpa stimulado ĉe la rok-en-rola muziko

Kiam pliparte kaj en antaŭo la *taktmetraj* bazelementoj de la muziko antaŭregas koste je harmoniaj kaj melodiaj strukturoj de la *natura* ritmo, tiel tiu muziko ankaŭ ne respondas al la ekvilibra beleco de la Dia kreitaro. Tiel ĝi estas *malkonvena por transporti la spiritajn, biblie orientitajn mesaĝojn*. La muziksociologoj kaj muzikpsikologoj konstatis unuvoĉe helpe de pluraj esploroj kaj eksperimentoj, ke la rok-en-rola muziko kaj ĉiuj taktritme formataj muzikaj ritmaj strukturoj stimulas antaŭ ĉio la korpajn ekscitiĝojn en la homo.

La rita trancmuziko de ŝamanoj efikas samtiel pere de tia ritma ripetadprincipo, sed eĉ pli fortigite efikas la fortlaŭtaj impulsoj de la tamburaj ritmoj per ilia tre dense sinsekva neharmonia supertona spektro sur la aŭd-nervan sistemon tro ŝarĝpeze kaj tiel la veka konscio povas esti puŝata ĝis la tranca stato.

Per modernaj sinteziloj (elektronikaj tonfariloj) kaj iliaj senlimaj eblecoj moduli la sonojn tiel en la alta, kiel ankaŭ la suba frekvenco, oni povas ankaŭ lige kun la sondifektado kaj komputila ritmo tre facile atingi tiajn trance stimulajn frekvencmiksaĵojn kaj helpe de plifortigaj aparatoj senkomplike atingi la dolorlimon de la homa aŭdnervo.

## La kialoj de la splitiĝoj en la komunumoj pro la demando pri muziko

Pluraj rok-en-rolaj kaj popularmuzikaj entuziasmuloj eble super tio ĉi demandos: *„Ĉu tia pliparte korpstimula miziko do estas tiel malutila aŭ eĉ pekohava? – Kiel okazas, ke do ni kaj multaj aliaj homoj kaj antaŭ ĉio intertempe jam multaj kristanaj komunumoj tiel ŝatas tiujn muzikstilojn de la ŝatataj kristanaj muzikbendoj? Ni antaŭ ĉio preferas tre decideme tian popularan muzikon kompare kun la tradiciaj kantoj, kies ‚eksmodaj' melodistrukturoj nin apenaŭ povas ankoraŭ motivigi por aŭskulti kaj eĉ malpli por kunkanti!“*

Nu jes, kiamaniere tio povis okazi? – La kialoj, kiuj kontribuis al tiu evoluo, estas prilumendaj plurfacete. La sekvaj pledadoj povus kelkajn al tradicio ligatajn anojn de la komunumoj ĉagreni, se oni al ili riproĉus, ke en kelkaj speciale tradiciaj komunumoj novaj kantoj apenaŭ estas tolerataj. Aliflanke tamen tiuj malnovaj kantoj ofte estas tiel tede proponataj, ke ekzemple sekve de la tro malrapida tempo esprimiĝas tia emocie nekonvena maniero, ke ofte tio tute ne adekvatas plu por la evangeliza mesaĝo de la kantotekstoj. Oni povas kompreni, se multaj junaj kristanoj ankaŭ pro tio ne povas sin identigi kun tio ĉi, ĉar oni tion tamen kantas nur laŭ *tia* maniero, kiel la pli altaĝaj anoj de la komunumo laŭ sia tradicio kutimas fari. Tiu, kiu volas ion ŝanĝi, por ekzemple ankaŭ ĉe novaj kantoj proksimiĝi al la bibliaj postuloj (psalmo


33,98 k. 149) aŭ eĉ arogas al si, la tedan kaj pro tio neniel tekste konvenan manieron kanti kritiki, tiu pliparte estas tro facilanime markita kiel la „tentulo“ flanke de la tradicie ligataj anoj de la komunumo.

Nature, la kvalito de ĉiuj novaj kantoj devas esti enketata laŭ ĉiuj *spiritaj kriterioj*, kiuj ekzemple ĝuste en la ĉi tie prezentita libro estas aparte rigarde al la objektivaj efikkarakterizoj de la proponitaj modernaj popularmuikstiloj prezentataj. Sed ĉar en nia tempo povas esti proponataj fakte tre multaj nespirite direktitaj kanttekstaj kaj muzikaj strukturoj, oni ankaŭ povas kompreni, ke multaj komunumoj pro singardemo preferas resti ĉe la tradicia kanttrezoro, se ili ne estas kapablaj, en la propono de novaj kantoj distingi inter la grejno kaj lolo. Sinlimigo je la tradicia kanttrezoro, nome, estas ankoraŭ ĉiam pli bona ol, se oni allasus tiajn modernajn muzikstrukturojn, kiuj pro siaj nespiritaj stimuladoj neniel efektivigus la *spiritan* superkonstruon.

*Daŭrigo sur la paĝo 22*



# Du novaj kantlibroj kun konataj kaj novaj kantoj por la biblifidelaj komunumoj, solistoj kaj korusoj





***Prefere jam konataj biblifidelaj kantoj troviĝas en:***

## Gemeinde-Gesangbuch / Singt von Jesus!

Kun 695 kantoj kun notskribo, aranĝoj por korusoj kaj por la gitara akompano. Eldonis: Samenkorn, Steinhagen, Artikel-Nr. 894160
Prezo: 13,90 €
*Samenkorn-Verlag, Liebigstr. 8, D-33803 Steinhagen, tel. 05204-92 49 43 0, faksilo 05204-88 80 05, E-mailo: info@samenkorn.de , hejmpaĝo: www.cvsamenkorn.de*
La nova kantlibro devus reflekti la kanttrezoron, kia ĝis nun estas flegata en la biblifidelaj komunumoj. Koncerne la elekton de la kantoj estis kekaj temkampoj, kiel inter alio la kristanaj festoj, pli forte konsideritaj. La kantlibro devus en la komunumoj kaj en familioj trovi benhavan utiligon. Ni deziras, ke la potenco de la Dia graco tiamaniere plikonstruu multajn korojn, ilin konsolu, admonu kaj preparu por la nova alveno de nia Sinjoro.

***Novaj biblifidelaj kantoj troviĝas en:***

**Mit neuen Liedern durch das Jahr**. 189 novaj kantoj por ĉiaj okazoj por la kristanaj komunumoj, solistoj kaj korusoj,




Jeremia-Verlag 2016, 189 kantoj, 340 paĝoj, *hardcover*, kudrita librobendado, 19,80 €
*Mendebla ĉe Jeremia-Verlag kaj ĉe la sekretariejo.*
Ĉu ankaŭ vi troviĝas en serĉado de novaj biblifidelaj kantoj? En tiu ĉi kantlibro (kun tekstoj kaj melodioj de Lothar Gassmann, korusa prilaboro de Adolf Graul k.a.) la komunumoj, korusoj kaj solistoj trovas novajn unuvoĉajn kaj plurvoĉajn kantojn por preskaŭ ĉiaj okazoj de la kristana vivo: laŭdado kaj adorado de Dio, misio kaj konvertiĝo, postsekvo kaj sanktigado, konsolo kaj kuraĝigo, la naskiĝo de Jesuo (Kristnasko), la sufero de Jeso (pasiono), la resurekto de Jesuo Kristo (Pasko), la Pentekosto, la Danko por rikolto, la novalveno de Jesuo Kristo, la Nova jaro, la matenaj kaj vesperaj kantoj, la vespermanĝo de la Sinjoro, la nupto, la adiaŭo kaj sepulto.

**Kondiĉigo de la muzika gusto pere de la taktritmaj muzikstiloj**

Bedaŭrinde multaj kristanoj estas laŭguste kondiĉigitaj por la mondeca rok-en-rola kaj populara muzikstiloj per ofta aŭdado de tiaj muzikstrukturoj kaj ili tiel perdas pli kaj pli da sentemo por la natura esprimforto de la melodiaj strukturoj, kiuj ne devas esti dirigataj de la taktritme karakterizaj tamburakompanadoj. Sed kiu inter ili konas la aŭtomatajn procedojn en la homa aŭdnerva sistemo, kie per la sekvo de aŭdalkutimiĝoj tute senkonscie estas establita taktritme karakterizata kondiĉigo, kiu ĝuste kiel sekvo de speciala taktritmo de la popularmuzijaj stiloj povas formiĝi.

Alie ol ĉe aliaj muzikstilaj variantoj de la spirritma karaktero, kiu ne estas pliparte dirigataj de la frapsekvoj en la *sama* tempsekvenco, alie povas ĉe la rok-en-rola kaj populara muziko *ĝuste kiel la sekvo de ĝiaj tipaj stereotipaj tempegalaj taktbatoj* (bas- kaj tamburinstrumentoj) formiĝi adekvataj nevrone situantaj *spac-tempaj skemoj* en la aŭdmemoraj centroj kaj eĉ pli kaj pli fortiĝi. Tiu fortiĝo okazas pere de la ripetada aŭskultado de la rok-en-rola kaj populara muziko, kie sekve de la konate ĉiam samaj taktritmaj incitreaga skemo de tiuj stilaj variantoj, kiuj jam per tiuj jam antaŭe estiĝintaj aŭdspuroj de nevronaj spac-tempaj skemoj sin povas pli kaj pli profunde engravuri en la cerbo per plia fortiĝo de la sinapsaj ĉelinterligoj.

Tiel plene *senkonscie kaj longtempe* kondiĉiĝas tiuj specialaj *taktritmaj aŭd-atendaj* sintenoj, por ne diri, ke ili „koncipiĝas“. Tiamaniere do nerimarkite multaj aŭskultantoj de muziko iĝas manipulataj laŭ la maniero de dependeco de certaj muzikaj stiloj, kiuj tiujn specialajn taktritmajn incitreagajn skemojn proponas, kiuj en la adekvataj spac-tempaj skemoj de iliaj cerboj jam kiel tiaj taktritmaj atendoj estas memorstorataj.

Tia kondiĉigo je la taktritmaj muzikstrukturoj kondukas poste en la plej oftaj kazoj al tio, ke aliaj muzikstiloj, kiuj estas proponataj per la varia ritmo konforme al la spirperiodo, al tiuj aŭskultantoj ne plu plaĉas. La nevronaj incitreagaj skemoj, formiĝintaj per la unuflanka taktritmo en ilia aŭdnerva sistemo, ne povas plu alkutimiĝi al la resonanco kun la ritma procedo de la muziko, ĉar la jam longtempe antaŭprogramitaj taktritmaj atendsintenoj nun dum la aŭdado de la spirritme karakterizaj muzikproponoj ne povas esti plenumitaj.

## La kriterioj por la spiritaj laŭdkantoj

Dio ebligas al ni scii pere de la apostolo Paŭlo, kiuj karakterizoj estu de ni flegataj; tion oni povas senpere apliki ankaŭ ĉe la muziko kaj kantoj por la komunumoj. Li diras: „Fine, fratoj, kio ajn estas vera, kio ajn honesta, kio ajn justa, kio ajn ĉasta, kio ajn *ŝatinda, kio ajn bonfama*; se estas ia virto, se estas ia laŭdo, tion pripensu“ (Filipianoj 4,8).

Ni do havas per tiu ĉi eldiraĵo el la epistolo al Filipiaanoj unu plian kriterion por niaj spiritaj laŭdkantoj. Ili devus esti laŭ la krea ordo de Dio simple *belaj, ŝatindaj kaj bonformaj*. La priskribaj vortoj *ŝatinda* kaj *bonforma* nur povas signifi, ke devas troviĝi certa balance inter la melodio, harmonio kaj ritmo ankaŭ en la bazo de niaj spiritaj kantoj. Kiel la spirita kanttrezoro devus ĉi tie konforme al la eldiroj al Koloseanoj 3,16 kaj Efesanoj 5,19-20 ĉio esti formata en konsidero al la komprenebleco de la kantotekstoj, ja ĉi tie ĝuste en la kunteksto kun la alvoko al la flegado de la spiritaj kantoj aparte estas nomata la “parolo” kaj la signifo de la „vorto de Kristo”.

Mezurite kaŭ tiuj ĉi kriterioj estas ekzemple la tiel nomata „kristana rok-en-rola muziko“ prototipa ekzemplo de la *nespirita* kanto. Ĉar la kompona strukturo kondutas ĉi tie rekte malproporcie al la konstruo de vera spirita kanto:

Ĉe la spirita kanto la rangordo estas:
1. la teksto troviĝas supre, sekvas
2. la melodio kaj harmonio, kaj poste
3. la ritmo, kiu <u>*devas al la supraj servi.*</u>

En la strukturo de la rok-en-rola muziko oni trovas ĝuste diabole *inversan* rangordon. Tie, nome, dominas:

1. la taktmetra ritma komponaĵo helpe de la ĉion ceteran supersonanta utiligo de la-taktfrape uzataj tamburoj aŭ la forte emfazataj taktfrapoj de la elektronaj tre laŭtaj basgitaroj, post kio duarange venas -
2. la ceteraj ritmo-melodiaj strukturoj, kaj nur laste -
3. aperas la teksto, kiun oni ofte pro la relativa troforta laŭteco de la akompana muziko ĉiukaze ne povas kompreni.

## La esenco de adorado en la spirito

Adora sinteno en la biblia senco, do konforme al la atendoj ĉe Dio, certe ne estos atingata per multaj modernaj tiel nomataj „laŭd-adoraj diservoj“, ĉe kiuj oni nun en la komunumoj opinias, ke oni povas enkonduki adoradon de Dio helpe de la moda populara muziko laŭ la mondecaj gustodirektoj. La *spirite* direktata adorado orientiĝas ekskluzive laŭ *Dio*. Do oni devas sin aranĝi por la atendoj de Dio en la senco de la preĝo en la epistolo al Hebreoj 12,2, nome per *deturno for de ni mem* kaj per *sinturno al Li*.

La modernaj popularmuzikaj stiloj efektivigas tamen ĝuste la kontraŭon, ja kongrue kun iliaj originaj utiligaj rilatoj stimulante la mondecajn distrajn aranĝojn, ili emfazas ĝuste tiun MI-sentnivelon, sopiranta volupton, de kiu ni devus nin deturni, por direkti nin for de nia malnova esto al la esto en Dio.

La vera baza signifo de la biblia esprimo „adoro“ povus esti laŭ la vort-vorta traduko el la hebrea lingvouzo en nian esprimmanieron tradukata per „sin ĵeti suben“. La unua biblia dokumento pri la uzo de tiu ĉi vorto estas aparte instrua por kompreni la praktikatan adoradon en la profunda senco, ja ĝi priskribas la obeon kaj personan pretecon je ofero de Abrahamo, kiam li sur la monto Moria laŭ la ordono de Dio estis preta oferi sian amatan filon en la senco de *adorado*.

Tiun ĉi gravan aspekton de la adorado oni pliparte forgesas en la plumpaj adorprovoj, sed ĝuste *tiu* adorsinteno ellasis la parolon kaj la agon de Dio! (Ekscelentan biblian argumentadon pri la vera adorado povas la leganto trovi ankaŭ en la rekomendinda libro „Ekstase oder Ergebung” – Ekstazo aŭ sindono – de Benedikto Peters). Ĉu tia adorsinteno povus eĉ nur spure okazi dum la tiel nomataj „laŭdadoraj diservoj”, kie per la sonsenta muzika aranĝmaniero la partoprenantoj ĝuste en *tiu* sia anima sentregiono estas enkondukataj kaj konfirmataj, kiu la memplaĉan *mem-vivon* de la homa animo plifortigas? (La populareco de tiaj muzikstiloj povas esti el tio klarigita.)

La laŭd-*ofero* en la biblia senco ankaŭ laŭ la novtestamentaj ekzemploj okazas essence alimaniere. Temas pri la oferpreta sindono de la arbitra „memo”, kio laŭ la vortoj de Paŭlo en la epistolo al Romanoj12,1 estas karakterizata kiel „racia servo”. En tiu ĉi kunteksto li ankaŭ avertas tuj en la sekva versiklo antaŭ la danĝeroj, kiuj kaŝiĝas en la asimiliĝo de la komunumo al la mondeca vivmaniero. Apud la preĝoj, la pensado kaj la laud-adorado, kiujn ni alportas al Dio, la persona preteco de sinofero de ĉiuj adorantaj partoprenantoj de ia diserva kunveno prezentas tre gravan komponaĵon.

Preteco por sekvi Kriston en la senco de Marko 8,34 kaj en similaj lokoj en la Skribo perdas sian signifon en la nuna tempo koncerne la „laŭd-adoraj diservoj“, dum kiuj oni per la moda popularmuzika stilo enpakas la evangelizajn mesaĝojn. Tiel ĝuste tiuj, kiuj troviĝas ekstere, la homoj de la mondo, kiujn oni volis tiamaniere atingi, ricevas *difektitan bildon pri Dio*, ĉar tiaj muzikaj „enpakaĵoj” elvokas misajn atendosintenojn je malmultekoste disponigata distra bonstata kristaneco, kia el tiaj atendsintenoj rezultas kaj pliparte kondukas al fortaj disrevigoj, ja ili okazas nur sur la anima nivelo, sen tuŝi la pli profundajn tavolojn de la spirita personeco de tiaj homoj.

Adorado en la Spirito laŭ la bibliaj indikoj de Johano 4,24 kaj Sentencoj 20,27 okazas nur tiam, kiam la muziko kun siaj esprimeblecoj nur la *vortmesaĝon priservas*. La animaj movoj, kiuj povas estiĝi pere de la muziko, devus per sia baza etoso konveni al la enhavo de la vorta mesaĝo kaj *nur tiun* emocie subteni. Pere de la al la *vorto konvena melodikonstruo*, kiu korespondas kun la *sencohava* tekstdeklamado kaj tiel ankaŭ la centran vortsignifon de la mesaĝo aparte markante povas elstarigi, estas fakte eble fortigi la bibliajn mesaĝojn helpe de la muziko.

La muziko nura povas kaŭzi ĉe la aŭskultantoj diversajn animajn movojn, sed la spiritan funkcion ĝi povas plenumi nur tiam, kiam ĝi per servanta sinteno indikas je la *vorta mesaĝo*, ĉar *tiu nura* la spiritan kernon formas, kiun oni devus prezenti. „*La vortoj*, kiujn mi diris al vi, estas spirit kaj estas vivo,” (Joh 6,63), tiel Jesuo instrukciis siajn disĉiplojn. Aparte senspirite efikas la rok-en-rolaj kaj popularmuzikaj stilvariantoj jam nur pro tio, ĉar kaŭze de ilia laŭtforto la kompreno de la teksto estas tre malhelpata. Laŭte marŝanta beat-muziko stimulas antaŭ ĉio la korpajn sentregionojn de la aŭskultantoj, per kio tamen neniam povas okazi *spiritaj* adorsintenoj.

**La resumo de la montritaj gvidlinioj kiel la rastro de la kriterioj por utiligi la muzikon kaj la kantadon en la kristanaj komunumoj**

*I. La efiko de la muziko en la kristanaj komunumoj dependas ĝenerale de tio, kia speco de la utiligata muzikaj esprimmodeloj tie estas uzataj.*

Koresponde kun la ĝisnunaj rekonoj pri la ĝenerala maniero efiki ĉe diversaj muzikaj strukturoj sur la homo, troviĝas empiriaj sciencaj esploroj kaj iliaj rezultoj: ili ebligas en certaj limoj objektivan prijuĝon de la efikmaniero ĉe certaj muzikstrukturoj. La prijuĝaj kriterioj tiel ne estas dependaj nur de la personaj gustoj kaj kulturaj konvencioj.

Ĉar surbaze de diversaj muzikstrukturoj ankaŭ la korespondaj diversaj emociaj kvalitoj povas esti transdonitaj al la aŭskultantoj, la muziko en la etika aspekto ne estas valorneŭtrala. Tial ĉe la elekto por la muzika uzo en la kristanaj komunumoj por la spirita leviĝo oni devus kiel la gravajn kriteriojn preni koncernajn eldirojn el la Biblio por ricevi konsilon, kaj sub sencohava apliko ĉe la nuntempaj cirkonstancoj kaj eblecojn.

*II. Kongrue kun la biblia eldiro de Filipianoj 4,8 la utiligataj muzikaj formoj kaj sonelementoj devus esti adekvataj al la natura ordo en la kreitaro.*

Kongrue kun tio laŭ la kreo por ĉiuj homoj la donita natura aŭddispozicio plia objektiva kriterio por elekti la melodiojn kaj harmoniajn funkciojn de la muziko. Al tio apartenas sekvaj faktoroj:

> Ekvilibra rilato en la ŝanĝo de la tensio kaj la maldensiiĝo, do nenia amasiĝo de la malharmoniaj sonoj sen la tensiaj liberiĝoj.

> La formalaj strukturoj de la muziko devus same reflekti en siaj proporcoj la en la kreitara ordo de la naturo donitajn simetriojn.

> La sonbeleco devus esti serĉata. La sonfremdaj, elektronike produktitaj tondifektoj kiel ankaŭ la bruegaj laŭtfortoj devus esti evitataj, ĉar ili ankaŭ damaĝas la aŭdorganojn kaj ili tro forte incitas la nervsistemon.

*III. Kongrue al la bibliaj postuloj ĉe Romanoj 12,2 la ĝenerale uzataj muzikaj esprimmodeoj, kiuj servas al la etoso dum la mondecaj distraj sferoj kiel la danca, distra kaj diskoteka muziko, devus esti evitataj.*

Koresponde kun Sentencoj 20,27 la muziko ne devus unue esti orientita laŭ la stimulado de la korpo, ekz. per laŭtaj kaj krude uzataj tamburaj batoj aŭ per la simile *daŭraj* taktbataj emfazoj helpe de la basinstrumentoj aŭ gitaroj, ĉar tiamaniere la anima-*spirita* nivelo en la aŭskultanto apenaŭ povas esti tuŝata.

Ĝenerale oni neniam devus *daŭre bati la takton per akompaninstrumentoj* (baso, gitaro, tamburo), ĉar sekve de la daŭraj taktbatoj la muziko facile ricevas karakteron de la danca kaj distra muziko kaj la aŭskultanto per tio antaŭ ĉio estas stimulata korpe. La spirita akceptkapablo por la vortaj mesaĝoj ĉe la aŭskultantoj povas tiamaniere esti forte bremsata, ja la Spirito de Dio efikas laŭ la eldiroj supre (Sentencoj 20,27) kaj ne pere de la korpa sentivo.

La ritmaj tempostrukturoj devus laŭ la natura krea ordo ne okazi per la maŝinoza kaj takte emfazata krudeco, kiel pliparte en la diskotekoj kutime okazas ĉe la rok-en-rola muziko. La ritmodona komputilo kaj la muziksenkvencilo proponas neniajn naturajn ritmajn strukturojn laŭ la krea ordo kaj ili kuras kontraŭ la organike donitaj homaj ritmoj de pulso kaj spirritmo.

La antaŭdonita agogiko (la „spirado“ interne de la muzika tempopaso per malgrandaj tempaj plilongigoj kaj responde al la ekvilibrigaj temposekvencoj kiel la superrangata tensia kaj maltensia interŝanĝo) laŭ la natura spira ritmo ne povas okazi per la tro laŭtaj kaj fronte poziciataj taktbatoj de la tamburaro aŭ de la basgitaroj per la permamente samaj tempsekvencoj aŭ ĝi jam dekomence estas neebla.

Tiamaniere la prefere motorika procedo de la muziko apenaŭ povas alparoli la spiritan nivelon de la homo, sed nur plu la korpan sentivan nivelon.

Teksto – ritmo – melodio – harmonio devus stari en ekvilibra interrilato por ke la aŭskultanta homo en sia tuteco de la spirito, animo kaj korpo povas esti alparolata.
a) La spirita nivelo estas per la teksta eldiro,
b) per la anima nivelo prefere helpe de la sinsekvo de la tensioj de la melodiaj arkoj kaj harmoniaj funkcioj de la muziko,
c) per la korpa sentiva nivelo ekskluzive alparolata pere de la ritmaj sinsekvoj ene de la muzika fluo.

La ritma iro de la muziko devus laŭeble ne enhavi la daŭre emfazatajn tamburajn batojn, ĉar pere de tio povas esti konstruata en la aŭskultantoj permanente alvipata ekscitotensio, kiel oni tion ankaŭ spertas ĉe la rok-en-rola muziko. Akompano de la komunumaj anoj al la enprofundiĝo, al la preĝado aŭ eĉ nur al silento estas ĉe tia muziko neebla.

Ankaŭ la tre laŭte emfazataj taktbatoj de bastamburo kun la daŭra stereotipo de egalaj tempsinsekvoj ne konvenas por la komunumoj, ĉar tiamaniere la vekkonscio de la aŭskultantoj iom post iom estas repuŝata. Pli longa aŭdado de tiaj mekanikaj ritmoj povas eĉ kaŭzi trancajn efikojn, kiel tio okazas en la tekna stilo. La Biblio tamen postulas de la komunumoj reteni sobrecon kaj vekecon (1Tesalonikanoj 5,6 + 8; 2 Timoteo 2,16; 1 Petro 4,8; 5,8).

Trancsimilaj situacioj povas tamen esti atingataj ankaŭ per certaj psikodele efikantaj sonstrukturoj de la muziko, kaj tio eĉ sen rekoneblaj ritmoj, nome antaŭ ĉio per la elektronike produktataj „sontapiŝoj" kun sferaj, ekstertere supozita radiado, kiu tute ne alparolas plu la korpan sentivan nivelon de la homo, sed la subkonsciajn tavolojn de la homa psiko, fantaziece ĝin gvidante en siaspecan meditan mi-senlimiĝon.

Ĉi tie do ankaŭ la *ekvilibro* inter la *spirito-animo-korpo* estas forlasita, sed nun en la direkto de certa psika simulado al la ekstermonda, senkorpe supozita malrealo, simile kiel ĉe la drogaĉa konsumado. La psiko de la homo povas sin tiamaniere preskaŭ senrimarkeble malfermi por la transcendaj regionoj, kiel dum la transcenda meditado de la malproksimazia karaktero. Tiel ankaŭ la muziko povas produkti drogaĉajn efektojn. La transcenda medito proponas same kiel la drogaĉoj kompare kun la savpropono de la evangelio mensogan kvazaŭsavon, komplete malbiblie kaj tio finfine ankaŭ estas pritaksenda kiel la antikrista propono, kiu devojigas for de la biblia kristaneco.

La *veka konscio* de la muzikaŭskultantoj tamen povas esti *repuŝata* pere de la ofte uzataj *ripetstrukturoj de la samsekvencaj mallongaj melodifragmentoj* en la rok-enrola muziko, kiuj ofte estas limigitaj nur je kelkaj tonoj, kiuj konstante ripetiĝas kaj efikas endormigante, ĉar la atendsinteno de la aŭskultantoj je la daŭra kuro de la muzika evento ne plu estas postulate per novaj aŭ almenaŭ iomete variaj melodiformoj.

La samajn efikojn de la repuŝado de la veka konscio havas la konstante ripetiĝanta harmoniŝanĝado aparte tiam, kiam nur tri aŭ eĉ nur du harmoniaj funkcioj estas en stereotipa samformeco konstante ripetataj.

Ĉe la normale konstruitaj kuntekstaj melodistrukturoj devus almenaŭ tiaj melodiskemoj ne esti utiligataj, kiuj per sia modeleco jam en la mondece karakterizaj modkantaj produktadoj estas larĝe utiligataj, ja cetere la *spiritaj tekstaj mesaĝoj facile suferas dekadenton kaj profanigon per la emocioj, stimulataj per la muziko de la distra senligeco*.

La evangeliaj mesaĝoj kaj ĝenerale ĉiuj bibliaj mesaĝoj devus esti alprenataj per decidema ligo kaj serioza preteco. Tial ili ne devas esti proponataj per la emocia gesto de la distra senliga maniero.

La emocia karaktero de la plipartaj modkantaj melodioj, kiuj estas disvastigataj en la amaskomunikiloj, radias malprofundan stentimentalecon sen la spirita profundo.

Kombinado de tiaj melodimodeloj kun la spiritaj tekstoj tiel eskapas la seriozon de la biblia mesaĝo. Tiaj melodioj povas kelkajn homojn anime forte stimuli ĝis certa moviteco, kiu tamen la pli profundan esencan nivelon de ilia spirita personeco ne atingas.

Se la spiritaj tekstoj estas proponataj lige kun la muziko, tiam la emocia esprimenhavo de la muzika devus reflekti etoson, kiu kongruas kun la *tekstesprimo* kaj *tiun* emocie emfazas.

Se la uzata muziko elradias tre fortan „propran vivon”, kiu ne kongruas kun la tekstesprimo, povas la muziko la aŭskultantojn devojigi for de la teksta mesaĝo kaj lian atenton portempe direkti al la muziko, ke tiel la teksteldiro plene estas repuŝata en malantaŭon. Tiam la muziko sian servan funkcion perdas kaj sin mem puŝas en la antaŭan lokon.

### *IV. Bibliaj kriterioj por la karaktero de la spiritaj kantmelodioj.*

Laŭ la bibliaj postuloj koncerne la *spiritajn* kantojn en Efesanoj 5,19 la centra *spirita komponaĵo* ĉe la kantoj estas *ekskluzive donita per la teksto*. Tial la *ritmaj strukturoj de la melodio devus kongrui kun la natura parolritmo* de akcentitaj kaj neakcentitaj silaboj, por ebligi la kompreneblecon de la teksteldiroj. La neakcentitaj parolsilaboj devus tiel laŭeble ne troviĝi sir la akcentitaj takttempoj kaj ĉe la akcentmoviĝoj per sinkopoj tiuj ne devus esti uzataj nur kun la akcentitaj parolsilaboj.

La melodioj devus do laŭeble elmontri neniajn *ritmajn specifojn*, kiuj ne estus konformaj kun la *natuaj akcentoj de la lingvo*, por povi servi kiel adekvataj portantoj de la tekstoj, de *komprenebleco kaj indikado de la teksteldiroj*.

*V. La kriterioj por la instrumenta akompana aranĝo.*

Por la akompaninstrumentoj ĉe la spiritaj kantoj valoras baze ankaŭ tio, dirita supre por la uzo de la muziko en la kristana komunumo ĝenerale.

La preludoj kaj interludoj devus esti limigataj je tiu etosa baza sinteno, kiu kore-spondas kun la teksteldiro por ĝin subteni. Se la interludoj efikas per tro laŭta, pure muzika elradiado, la aŭskultantoj povus jam nur de tio esti fascinataj kaj tiel tro forte ligataj al la muziko, per kio la spirita alpreno de la tekstmesaĝo povas esti malhelpata aŭ eĉ malebligata. Per profesia maniero rafine realigata sonsenta akompana aranĝo, kiu la aŭskultantojn cetere povas stimuli por tro forta anima eŭforio, tamen misgvidas la atenton de la sama teksteldiro, kiu tamen volas esti komprenata *spirite*.

La tro forta anima ekscito pere de la muziko povas la spiritan perceptpretecon por la tekstmesaĝo ankaŭ nebuligi kaj tiel malhelpi, ja laŭ la Sentencoj 20,27 la Spirito de Dio agas, kiu estas nepre bezonata por la spirita kompreno de lia vorta mesaĝo, ne pere de la anima nivelo de la homo, sed ekskluzive pere de ties spirito.

AMPLEKSAN SCIENCAN BAZON POR TIU ĈI ARTIKOLO VI POVAS TROVI EN:

ADOLF GRAUL:

**ROCK-, POP- UND TECHNOMUSIK UND IHRE WIRKUNGEN**

*EINE WISSENSCHAFTLICHE UND BIBLISCHE UNTERSUCHUNG,* CLV, PAPERBACK, 320 SEITEN

EN LA PRESITA FORMO MOMENTE BEDAŬRINDE DISVENDITA (REPRESO DE MULTAJ LEGANTOJ DEZIRATA!). ELEKTRONIKA STORADO EBLA SUB:




http://clv.de/Buecher/Sachbuecher/Rock-Pop-und-Technomusik-und-ihre-Wirkungen.html

*Surpapere* liverebla estas la kolporta broŝuro:

**MUSIK. Kann man mit jeder Musik Gott loben?** (kun kontribuaĵoj de Adolf Graul kaj Lothar Gassmann), 2,- eŭro. Samenkorn-Verlag, Tel. 05204-9249430, info@cvsamenkorn.de www.cvsamenkorn.de

# Ĉu la protestantismo troviĝas antaŭ sia bankroto?

*Elplume de la misiisto Manfred Kämpf, CH-Wetzikon / Peruo*

La malakcepto de Jesuo kiel mesio kaj lia krucumado signifas por la juda mondo spiritan bankroton. Kiel sekvo de tio diversaj kristanaj eklezioj anoncis kun certa orgojlo kaj tropretendo: La kristana mondo nun estas anstataŭ la judoj la nova popolo de Dio. Okaze de grandskala aranĝo en Berlino oni eĉ revis pri tio, ke la kristana mondo nun troviĝas en ebleco post longa periodo de la humila „rana” ekzisto leviĝi al la „regno” – kompreneble sub la imago de la ekumenisma unueca mondeklezio post la venka forigo de la eklezia dissplitiĝo. Tio estus grandioza celo, se la tuta mondo tiel kunvenus, alaŭskulti la voĉon de Kristo kaj finfine estus regate laŭ la volo de Dio, tamen la tuto devus stari sur la bazo de la vero kaj realo!

Anstataŭ tio la kristana mondo samtiel estas minacata ĝisvivi la spiritan bankroton – unuflanke per la alpreno de la malbiblia tn. „ekumenisma unueco”, do de la propravola reiro de la protestantaj eklezioj sub la tegmenton de Romo – kaj aliflanke per la fordono de la iam per la sango de martiroj multekoste aĉetitaj reformaciaj veroj kaj la reformacia libero. Efektive kristanoj sukcesis atingi la „rekonon de la vero” (1 Timoteo 2,4); sed nun minacas la totala kaoso – ĝuste kiel la profeto tion esprimis: „Mia popolo pereos pro tio, ke ĝi ne havas scion” (Hoŝea 4,6).

Jam antaŭ kelkaj jaroj skribis ekz. la evangelia teologo, d-ro Werner Neuer el la seminario St. Chrischona, post iu renkontiĝo kun la papo, tre entuziasme pri la „ekumena grandstelo“ kaj samtempe mesaĝis al ni la deziron de la papo okaze de la reformacia jubilea jaro 2017 per la vortoj: Estas dezirinde, se okazus „komuna konfeso de la kulpo“ kaj la „konfeso de la komuna kristana kredo“.

### La fremda paŝtisto

Tamen ĉi tie ŝajnas ĉio stari surkape. La protestantoj, kiuj dum jarcentoj estis de la papo, do de la ŝajna „superpaŝtisto de la kristana mondo” ĉasitaj kiel buĉŝafaro, torturitaj, strangolitaj, bruligitaj kaj mortigitaj, ili nun devus penti, ĉar ili de li sukcesis fuĝi kaj fondi de Romo sendependajn ekleziojn kaj komunumojn. Sed la „ŝafoj de Kristo“ estis de tiu „roma paŝtisto“ elrabitaj, ĉar ili lian voĉon ne rekonis la voĉo de la „bona paŝtisto“, ja Jesuo eksplicite instruas: „Mi estas la bona paŝtisto kaj miaj ŝafoj konas mian voĉon; la fremdan paŝtiston tamen miaj ŝafoj ne sekvas, sed de li fuĝas, ja ili ne konas la fremdan voĉon“ (Johano 10,1-14).

Evidente oni prave diras, ke la homo lernas el la historio nenion. Foje mi eĉ travivis, kiel en ĉeesto de pluraj fratoj iu instruisto pri la Biblio laŭte anoncis: „La eklezia historio estas merdo”. Tiu kunlaboranto estis, kiel poste montriĝis, adepto de certa revspirita rondo kaj li volis per sia drasta formulado diri: „Ni staras en la hodiaŭo kaj devas nin disponigi al la hodiaŭaj defioj, ja tio, kio estis hieraŭ, interesas nin ne plu.”

Kiel akvumita pudelo oni post tia „instrukcio“ iras al sia hejmo kaj komencas pripensi. Oni demandas sin: Ĉu la Biblio mem ne estas grandparte kolekto de la historiaj libroj? Kaj poste oni malkovras, ke la Biblio eĉ emfazas grandan valoron por la historiaj raportoj, ja en 1 Korintanoj 10,1-11 ni legas: Certaj okazintaĵoj de la pasintaj tempoj estis „notitaj”, por ke ili servu al ni „kiel averto”. Kaj ĉu nia SINJORO JESUO mem ne referis al la delonge pasintaj okazintaĵoj, kiam li rememoris pri „ĉia justa sango, kiu sur la tero estis verŝita, ĝis la sango de la justa Habelo” (Mateo 23,35)?

Kaj ĉu eksplicite en nia tempo, meze de la fintempa evoluo, ni do devu malestimi la historian kiel ion senvaloran? Eh, malrapide oni povas kompreni: la kristanoj, kiuj dum 50 lastaj jaroj estis ekspoziciitaj al forta ekumenisma propagando, devus esti pli malfermataj por tio, kio estas la hodiaŭa trendo – do malfermataj por la spirito de la tempo. Ni devus ĉesi rememori je tio, kiom da martiroj tiam devis pagi, ĝis per la helpo de Dio okazis la liberiĝo elsub Romo kaj sendependaj evangeliaj eklezioj estis fonditaj.

Ni ankaŭ devus perdi la konscion, ke la reformatoroj, speciale M. Lutero, eĉ ne parolis pri la dissplitiĝo for de la kristana mondo, sed nur pri la „liberiĝo de la kristana mondo el la babilona kaptiteco” (komparu la traktaĵon de Lutero: „Die babylonische Gafangenschaft der Kirche Christi” – La babilona kaptiteco de la eklezio de Kristo). Ankaŭ 288 anglaj martiroj devus esti forgesitaj, kiuj dum la 5-jara gegado de la „sangoverŝa” reĝino Maria estis brulitaj vivaj sur la ŝtiparo, ĉar ili insistis ĉe la protestanta kredo kaj prefere elektis la morton en la fajro ol sin subĵeti al la romaj, malbibliaj dogmoj. Inter tiuj martiroj troviĝis 1 ĉefepiskopo, 4 episkopoj, 21 sacerdotoj, 55 virinoj kaj 4 infanoj. Ni do devus havi neniajn klarajn vidojn pri tio, kiel granda beno estis donita al la kristana mondo per la kvar grandaj ĉefkolonoj de la protestanta kredkonfeso:
Nur Jesuo, ĉar LI estas la nura peranto inter Dio kaj la homo.
Nur la fido kaj nur la graco kondukas al vera certeco pri la saviĝo.
Nur la Sankta Skribo posedas la aŭtoritaton super la kristana kredo.

**La fatala eraro**

Ankaŭ ni devus ne plu rememori pri tio, kiel tiam en Eŭropo la katolika kontraŭreformacio furiozis. Du inter la romaj invadoj estis aparte kruelaj kaj insidaj – tiu en la

jaro 1572 en Francio kaj tiu en la jaro 1641 en Irlando. Ambaŭ masakroj procedis laŭ similaj planoj. Antaŭ ĉiu el ambaŭ atakoj okazis tempo de ŝajna interpaciĝo. La katolikoj kaj la protestantoj ŝajne povis vivi inter si pace, ja la katolikoj kondutis amikŝajne kaj afable rilate al la protestantoj. En Francio la reĝo eĉ aranĝis nupton de sia katolika fratino kun unu el la protestantaj estroj, por tiamaniere trompi per la signo de la ekumenisma kunekzisto.

La protestantoj, kiuj estis alkutimigitaj je brutala persekutado kaj subpremado, spertis tiel grandan faciliĝon, ke ili tiun paceman kunekziston fidis kaj malstreĉis sian atentsintenon. Ili vidis konfirmita, ke Vatikano nun fakte sin ŝanĝis. Sed tio estis ilia fatala eraro, kiu kostis ilian vivon. Se ili tamen pli zorge atentus la averton de Jesuo antaŭ la „lupoj vestitaj en la ŝaffeloj” (Mateo 7,15) – do la averton antaŭ la murdistoj, kiuj sin prezentis kiel servistoj de Dio! Se nur ili estus pli serioze prenintaj la instruon de Jesuo pri la „malbonaj arboj, kiuj neniam povas doni bonajn fruktojn” (Mateo 7,17-18) – ke do ankaŭ la arbo „papeco en Romo”, pri kio ekzistas klara historia dokumentaro, ke ties „fruktoj” estis la plej teruraj persekutoj de la kristanoj, neniam povas esti konvertata!

Tiel do meze de la „ekumena paco“ ek de unu momento al la alia aperis mortigado, kiu en Francio postulis minimum 30.000 mortigitojn (kelkaj aliaj historiaj esploristoj parolas pri pli alta nombro) – kaj en Irlando 40.000 da ili.

Kompreneble oni devas rialte tion konsideri, ke en la kazo de la katolikaj persekutantoj temis pliparte pri la religie motivigitaj fanatikaj adeptoj de la romaj povointeresoj – tiam nomitaj „romulaĉoj” – dum la seriozaj piaj katolikoj mem devis suferi persekutadojn, kiel ekzemple la ĉefepiskopo Thomas Cranmer, d-ro Rowland Taylor kaj aliaj!

La papo Gregorio XIII-a kiel la memdifinita „superpaŝtisto de la kristana mondo” devus esti perpleksita pri tiel terura forbuĉado de la „ŝafoj de Kristo”, sed anstataŭ tio, li trovis en tio motivon por festi. Por sian triumfon ankoraŭ pli bone kaj daŭre esprimi, li lasis la memoron pri la murda nokto en Parizo, nomita ankaŭ „sanga nupto” signi sur propra metalmonero.

Ankaŭ la nuntempa kristana mondo post la 2-a vatikana koncilio travivis 50 jarojn daŭrantan tempon de la ŝajna alproksimiĝo kaj interpaciĝo kun la roma eklezio. Antaŭ la koncilio la protestantoj estis por Romo nur „herezuloj”, sed subite ili fariĝis „disigitaj fratoj”. Tiu ĉi strategio estis tiel sukcesplena, ke nuntempe multaj kristanoj el la evangeliaj komunumoj venis al la konkludo: Vatikano de niaj tagoj ne plu estas komparebla kun la iamaj tempoj – multo tie aliformiĝis en pozitiva senco. Nun valorus antaŭ la mondo demonstri unuecon, por atesti la aŭtentecon de la kristana mesaĝo.

Kiel bele estus, se oni povus al tio aliĝi, tamen la faktoj parolas bedaŭrinde tute alian idiomon. Ni nur devas observe kelkajn citaĵojn, elprenitajn el la „Katolika Eklezia Juro” (Codex Juris Canonici), nove redaktita kaj eldonita en la jaro 1983:

Can. 331 kaj 333, p. 100 diras: „La papo … la vikario de Kristo … posedas la superan povon de la dia juro. Tiu do al li ne estas transdonita de la homaj institucioj, kiel la tuteco de la kredantoj aŭ de la episkopoj … liaj decidoj bezonas nenian konfirmon … kaj ne troviĝas riproĉrajto ĉe iu alia instance” (cann. 1404).

La papo estas la plej supera leĝdonanto kaj la plej supera juĝisto. Li mem responsas al neniu tribunal. En la servo de la instruado la papo posedas la plej altan aŭtoritaton (ne ekzemple la Biblio, la skribita VORTO DE DIO). La decidoj „ex cathedra” estas seneraraj.

La paĝo 357, § 124, pri la punagoj kontraŭ la religio kaj la unueco de la eklezio: Can. 1364: La apostazio de la kredo, la herezo kaj la sekteco estas la plej gravaj krimagoj kontraŭ la adorado de Dio kaj unueco de la eklezio.

Laŭ cann. 751 „la herezo“ estas la insista negado de la katolika instruo, kaj „la skismo” estas la malakceptado sin subĵeti al la papo.

La paĝo 71, Can. 205 pri la bapto: „La bapto povas esti akceptita nur unufoje; tiu … aneco en la eklezio ne povas esti retirata”.

Laŭ tiuj ĉi malmultaj ekzemploj el la romkatolika eklezia juro oni certe ne demandas sin malprave: Kaj kie restas la tiel nomataj „homaj rajtoj” pri la libero de la kredo? Ĉu probable tamen proksimiĝas la en la Biblio profetita fintempa diktaturo, ja oni povas en proksimo de si klare observe, kiel certaj povoj ĉiam pli energie volas establi la „kontraŭkristanajn strukturojn”:

- per laŭeble baldaŭa forigo de la kontanta mono,
- per la popularigo de la nombro 666,
- per la instalado de „falsaj profetoj" ĉiuloke (la en la Biblio anoncita sangavida asistanto de Antikristo),
- per opresado de la opinilibero,
- per intenca stimulado de morala kaduko ene de la popolo …

Romo tiel pli klare ol iam ajn antaŭe ankrigis sian „eklezian juron”: la papo havas la plej supran povon super la Dia juro, li estas la plej supra leĝdonanto kaj juĝisto kaj havas la plej altan instruan aŭtoritaton, per kiu estas definite, kio „la apostataĵo de la fido” estas kaj kio la „herezo” estas. Tiel ĉiu protestanto  kaj same ankaŭ ĉiu serioza katolik devas al si starigi demandon: Ĉu ĉi tie ne sidigas sin homo sur la loko de Kristo kaj tiel farante sin antikristo? La vorto „anti” ja ne signifas nur „kontraukristo”, sed ankaŭ povas signify, ke iu „anstataŭe de Kristo“ sin pozicias. Jesuo mem tamen nin sufiĉe esprimforte avertis antaŭ tiuj, kiuj „sub mia nomo venos kaj diros: Mi estas kristo“ (Mateo 24,5)

**Kristanoj estas provokataj**

La nuntempa kristana mondo do estas provokata decidiĝi pri sia starpunkto, kaj oni starigas al si demandon: Ĉu la protestantoj en la jubilea reformjaro 2017 fakte devus konfesi sian „kunkulpon“ kaj „penti“ pro sia riproĉe „forta misago kontraŭ la unueco de la eklezio“ (vidu: Can. 1364)? Ĉu la protestantoj pentos pri ilia riproĉita „herezo“, per kiu ekzemple ili la roman trasforman instruon pri la elementoj „pano kaj vino” ĉe la „vespermanĝo de la Sinjoro“ kontrŭdiras? La papo kun sia „plej supera instrua aŭtoritato“ nomas tian sintenon „insista negado de la katolika instruo” (vidu Can 751). Tial tekstas ja ankaŭ en la papa instrua letero „Ut unum sint“ (latine: Por ke estu unu): „La celebrado de komuna vespermanĝo de ĉiuj kristanoj povos esti ebla nur post la restarigo de plena eklezia unueco” – do nur tiam, kiam ankaŭ la protestantoj denove genuos antaŭ la hostio kaj en ĝi adoros Kriston, kvankam la informacia kredo rekonis la veron, ke la pano kaj la vino estas simboloj, kiel ĉe aliaj metaforoj: „Jesuo, la pordo” aŭ „Jesuo, la vito”.

Same restas la demando: Ĉu la „protest-farantoj” demetos ĉion misfaritan kaj retrovos sian vojon al la „protesto” kontraŭ ĉiuj romaj misinstruoj, kiuj la VORTON DE DIO kontraŭdiras? Ĉu ili kun d-ro Marteno Lutero konfesos kaj ĉe tio restos: „Mia konscienco estas ligita al la vorto de Dio. Ĉi tie mi staras, Dio min helpu, mi ne povas alie“? Estu ke la protestantoj kun la helpo de Dio sukcesu ne eniri la grandan gregon de la ekumena unueco. Jesuo mem parolas pri sia „malgranda grego“ (Luko 12,32). Aliflanke oni povas por ĉiuj sinceraj, piaj kaj seriozaj katolikoj deziri, ke ili perceptas la Dian alvokon en Apokalipso 18,4: „Eliru el ĝi!”

# CGD-raportoj

## Klara sindeklaro por Jesuo konfronte al la ateistoj kaj muzelmanoj - aŭ tamen alflatiĝo al la islamo?

Nuntempe ni travivas strangan fenomenon. **Dum multaj spirite mortaj germanoj simple dormas, iras pli kaj pli multaj eksterlandaj kristanoj ĉe ni sur la straton kaj anoncas, kun ĝojiga klaro, ke JESUO KRISTO estas la nura vojo al DIO, al la Patro en la ĉielo**. Tiel ekzistas aro da videoj *youtube*, kiuj la ardantan engaĝon, ekzemple de la kristanoj el la siria, turka, kurda kaj armena lingvoareoj, demonstras sur niaj stratoj. Tian videon oni ekzemple trovas en *youtube*, se oni entajpas tiun ĉi belan titolon: ***"Evangelisation in Hannover - Straßeneinsatz in christlicher Mission: Jesus rettet!"*** Tiaj engaĝoj estas nepre rekomendindaj por ilin imiti, dum tio ankoraŭ estas ebla! **Samtempe, ĉiuokaze, multaj germanoj opinias, bedaŭrinde ankaŭ en la evangeliaj rondoj, ke oni devus pli kaj pli alflatiĝi al islamo**. Kiel ni ekkonis, oni en iu komunumo en la provinca eklezio ekzemple forigis la krucifikson, kiam ili invitis la islamajn azilserĉantjn – en la okuloj de muzelmanoj klara signo de submetiĝo. La urbestro de Monheim am Rhein proponis al muzelmanoj senpage la konstruparcelon por ilia moskeo – evento, pri kiu ia kristana komunumo, kiu nepre serĉas por si ejon kaj parcelon, povas nur revi. Kaj konata evangelia referento kaj aŭtoro kun ligoj al la Evangelia Alianco veturas tra la provincoj eĉ kun la temo: **„Was Christen von Muslimen lernen können"** (Kion la kristanoj povus lerni de la muzelmanoj). Probable la referento kaj la komunumoj, kiuj lin invitas, ne havas konscion, sed tia temo estas en la okuloj de la muzelmanoj denove Klara signo de **submetiĝo**, kiel ekzemple esprimis tion draste la sekularisma franca aŭtoro Michel Houellebecq en sia (pro la malpura lingvaĵo ne vere rekomendinda) romano „Soumission" (submetiĝo). *Karaj kunkristanoj, ni rezistu antaŭ tia alflataĵo kaj submetiĝo kaj ni anoncu JESUON KRISTON en klareco kaj vero!*

## La reformatoro Marteno Lutero ene de la nuntempa evangelia eklezio (EKD) ne havus lokon

Almenaŭ **nun Marteno Lutero estus elĵetita el la „68-a EKD" aŭ li demisius mem!** Kiu tion ne kredas, bonvolu legi la sekvan informon el „idea online" de 27-a Junio 2016. Tie tekstas inter alio: „La reformaciaj limstarigoj kontraŭ la islamo ne povas esti senŝanĝe esti aplikataj en nuna tempo. Tiun ĉi vidon reprezentas la Konferenco pri la priislamaj demandoj de EKD sur impulspapero kun la titolo ‚Reformacio kaj islamo'. … Kiel sur la

papero tekstas, devus la rilato inter la evangelia eklezio kaj islamo esti difinita nove. … ‚Ĉiuokaze oni devus sin demandi sub aspekto de ‚solus Christus' (nur Kristo), kiamaniere la tie esprimita ekskluziveco de Jesuo Kristo povas ene de religie plureca socio okazi, sen esti perceptata en dialogo kiel tro pretendema kaj altnaza'. La reformacia vido de islamo, aparte tiu de Marteno Lutero (1483-1546) el la hodiaŭa vidpunkto probable ŝajnas tro polemika kaj unuflanka. Ĝi troviĝas tiel ‚en klara tensio kun la nuntempa dialogeca engaĝo, kiu volas dediĉi al la memkompreno kaj memstareco de la islama kredkonfeso respekton kaj atenton'." **Ho ve, EKD!**
P.s.: En tiun ĉi linion konvenas la sekva informo tuj antaŭ la redakta finlaboro (21.7.16): https://jungefreiheit.de/kultur/gesellschaft/2016/landeskirche-bereiten-bibelgruppen-mehr-sorgen-als-islamisten/ **„**La Evangelia-Lutera provinca eklezio de Saksio esprimis sian zorgon pri la efiko de la evangelikalaj kristanoj: ‚Rilate danĝeron por la saksa junularo la radikalaj bibliaj grupoj signifas multe pli grandan problemon ol la islamistoj' diris la respondeculo por la mondpercepto kaj sektoj Harald Lamprecht, responde al Dresdner Morgenpost…" *Nia opinio: Tiel la pinta rondo de EKD preparas la persekutadon de la biblie fidelaj kristanoj. Eliru el ĝi!*

## SCM: Malbona monopoliĝo ene de la evangelikala eldonista kampo

„idea online" aperigas 3-an de Junio 2016: "La eldonista grupo SCM por subteni la kristanajn amaskomunikilojn (Witten) plu konstruas sian gvidan pozicion en la evangelia eldonista kampo. Ĝi transprenas je 1-a de Julio la eldonejojn Gerth Medien kaj adeo (Aβlar bei Wetzlar) de la eldonista grupo Bertelsmann Random House (München). … La instituto Christliche Medien … estis 16-an de Junio 2000 fondita kun la celo, la kristanan eldonadan, amaskomunikilan kaj publikprezentan laboron subteni. La eldonista grupo SCM kun la eldonejo SCM (markoj Hänssler kaj R. Brockhaus), kun ICMedienhaus (komerco kaj logistiko) kaj SCM Bundes-Verlag (gazetoj kaj interretaj portaloj) dungas ĉirkaŭ 300 kunlaborantojn. La entrepreno Gerth Medien, al kiu apartenas ankaŭ la virina gazeto ‚Lydia' kaj adeo, dungas 80 kunlaborantojn." ***Nia opinio: SCM tiel transprenis ĉiujn grandajn kristanajn eldonejojn. Apud tio aperas sub la gvidado de SCM (financita de miliardulo Friedhelm Loh kaj teologie gvidata de Ulrich Eggers, la subtenanto de la blasfema ‚Volxbibel') pluraj gazetoj (family, Aufatmen ktp.). Granda danĝero: Nun ni havas la fintempan monopoliĝon kaj globalizadon ne nur en la mondo, sed larĝe ankaŭ en la evangelikala kampo – kaj ni tion NE prenas por spirite sana afero. Danke al Dio troviĝas ankoraŭ kelkaj sendependaj malgrandaj kaj pli grandaj eldonejoj, kiel CLV, Betanien, Jeremia, Samenkorn, 3L, Hirtenstimme ktp., kiuj cetere havas diversan teologian orientiĝon, sed almenaŭ ili ne naĝas sur la ondoj de la ekumenisma kaj karismatisma movadoj. Ili parte troviĝas rande de sia ekzistominimumo, ĉar ili estas prisilentitaj fare de la grandaj eldonejoj de la ĉeno SCM, subvenciita per milionoj.*** *La biblie kredantaj devus preĝi por la kunlaborantoj de la monopoliĝintaj grandaj eldonejoj kaj la sendependajn eteldonejojn subteni per pli da aĉetoj.*

## EŬROPA-PETLETERO defendu la kristanajn valorojn!

En EŬROPA-PETLETERO, sendita al la pet-leteraj komitatoj de la parlamento de Eŭropo kaj al diversaj registaroj, estas postulata protekto de la kristanoj kaj de la kristanaj valoroj. Tiel tekstas en la pet-letero inter alio:

*Decideme ni pledas por la libero de opinio, presaro, kunvenado, religio kaj konscienco en Eŭropo. Ni malakceptas ĉiujn leĝojn kaj mezurojn (inkluzive la kontraŭdiskriminajn leĝojn), kiuj tiun liberon en iu ajn maniero limigas.*

*Ni insistas ĉe la ŝtatleĝo de la Federacia Respubliko Germanio kaj ĉe la kompareblaj leĝoj en aliaj eŭropaj ŝtatoj. Ni estas dankemaj por la tie enankriĝintaj liberrajtoj kaj por la refero al Dio. Ni pledas kontraŭ tio, ke la germana juro per la eŭropa juro surbaze de ateismo kaj sen vera libero por la gecivitanoj estu elpuŝita.*

*Ni salutas kaj subtenas la apartan protekton por la geedzeco (geedzeco inter unu viro kaj unu virion) kaj por la familio, kiel ekzemple per la artikolo 6 de la germana ŝtatleĝo. Ni obĵetas la falon de tiu ĉi protekto per la ĝenra ideologio (kiu asertas, ke troviĝas senlima „sameco" inter la supoze plura nombro da seksaj identoj) en la reformkontrakto de EU (art. 2).*

*Ni defendas la protekton kaj la dignon de la homa vivo ek de la koncipiĝo ĝis la natura morto. Jam la ankoraŭ ne naskita infano estas individua homa persono, samtiel la handikapitaj, malsanaj kaj maljunaj homoj. Ni obĵetas distingadon inter „homo" kaj „persono", ja ĉiu homo ek de la koncipiĝo ĝis la natura morto estas per la leĝo protektenda persono.*

*Ni pledas por tio, ke la kristanoj en Eŭropo retenu la samajn liberrajtojn kiel aliaj homoj, ankaŭ por misiado kaj evangelizado en la publika loko. Ni avertas antaŭ la persekutado de la kristanoj en Eŭropo sub la kaŝmantelo de „fundamentalismo" aŭ „diskriminado", al ili riproĉataj. Ni avertas antaŭ la kreskanta islamigo de nia kontinento kaj ni engaĝas nin kontraŭ la alpreno de la ŝario en Eŭropo. Ni pledas por la reteno de la kristanaj valoroj kaj la amo al Dio kaj al niaj kunhomoj.*

La petletero povas esti signata ĉe CITIZENGO sub la interreta adreso:
http://www.citizengo.org/de/signit/35523/view

# 7. Konferenco pri la fina tempo SUDO
en Bad Teinach / Schwarzwald, 14.-18. Septembro 2016

Merkredo, 14.9.2016:
19.30: Reinhold Messal: Saluto kaj komuna preĝo
20.00: Lothar Gassmann: Tremado de la fina tempo!

Ĵaŭdo, 15.9.2016
10.00: Karl-Hermann Kauffmann: La Dia konduko en la finan tempon
16.00: Fritz Springer: Ĉu eble per „kristana rok-en-rola muziko“ adori Dion?
19.30: Karl-Hermann Kauffmann: Troviĝas „tro malfrue“ en la fina tempo!

Vendredo, 16.9.2016:
10.00: Lothar Gassmann: La glita enŝteliĝo: Evangelikalaj iam kaj nun
16.00: Sascha Götte: La profetaĵo pri Tyrus el Jeĥezekel 26-28
19.30: Uwe Bausch: Kaoso antaŭporte! Eŭropo kaj la kristana mondo fokuse

Sabato, 17.9.2016
10.00: Sascha Götte: La modela fido de Henoĥ
14.00: Uwe Bausch: Nombroj en la fina tempo. 1. parto: La biblia signifo de nombroj
16.00: Uwe Bausch: Nombroj, 2. parto: La okulta signifo de nombroj
20.00: Karl-Hermann Kauffmann: Nun antaŭ Dio vivi en la fina tempo

Dimanĉo, 18.9.2016: 10.00: Reinhold Messal: La savo proksima! (Diservo)

**Konferencoj pri la fina tempo SUDO**
en Bibelheim Haus Sonnenblick,
Poststr. 25, D-75385 Bad Teinach
Tel. 07053-92600, Fax 07053-926099,
HausSonnenblick@t-online.de www.haus-sonnenblick.info

Ĉiuj prelegoj de la antaŭaj 6 fintempaj konferencoj SUD registritaj sur 6 MP3-CD kaj akireblaj ĉe la sekretariejo de DER SCHMALE WEG (je 9,80 Euro plus porto).

# Lsa konferenco pri la fina tempo NORDO

en Hohegrete /Westerwald, 2.-6. Novembro 2016

## ° Merkredo 02. Novembro 2016

| | | |
|---|---|---|
| **19:30:** | Enkoduko „Fintempo! Levu viajn kapojn!“ | M. Traut |
| **20:00:** | Jesuo digna por preni, la libro ... | H. Oettershagen |

## ° Ĵaŭdo 03. Novembro 2016

| | | |
|---|---|---|
| **10:00** | Rigardo al tiu, kiu venas en la kaoso de la tempo | J. Ramel |
| **16:00** | La spirita lukto de la resto, el Apo 3 | K.H. Kauffmann |
| **19:30** | Jubilo en la ĉielo kaj la nupto de la Ŝafido | M. Traut |

## ° Vendredo 04. Novembro 2016

| | | |
|---|---|---|
| **10:00** | La mondo maturiĝas por la tago de rikolto | W. Keim |
| **16:00** | La filoj de Ciono kontraŭ la filoj de Grekio | R. Schmidt |
| **19:30** | La tri anĝelaj mesaĝoj en la Apokalipso | L. Gassmann |

## ° Sabato 05. Novembro 2016

| | | |
|---|---|---|
| **09:45** | Firmeco de la sanktaj dim la kontraŭkristana opreso | F. Maché |
| **11:00** | La 144.000 kaj la granda popolamaso | Gassmann |
| **16:00** | La granda tentado de la kristana junularo | R. Ebertshäuser |
| **19:30** | La maturiĝo en la fintempo | K.H. Kauffmann |

## ° Dimanĉo 06. Novembro 2016

| | | |
|---|---|---|
| **09:45** | Kiel ricevi povon, naĝi kontraŭ la fintempa fluo | R. Ebertshäuser |
| **11:00** | Fino kun la vespermanĝo de la Sinjoro | M. Traut |

**La aktualaj konferenoj pri la fina tempo NORDO**

en Bibel- und Erholungsheim Hohegrete, 57589 Pracht / Westerwald-Sieg,
Tel. 02682-95280, Fax 02682-952822
Email: hohegrete@t-online.de

La antaŭaj prifintempaj konferencoj NORD estas registritaj kaj povas esti akirataj rekte ĉe Hohegrete. Se intereso, bonvolu demandi ĉe Hohegrete nachfragen. Dankon.

1516 / 1517 - 2016 / 2017: Antaŭ la reformacia jubileo:

# Epistolo al Romanoj – la elirpunkto de la reformacio

Biblia semajno dum 10.-16. Oktobro 2016 en Bad Teinach / Schwarzwald

Referento: D-ro Lothar Gassmann

Lundo, 10.10.16: 19.30: La evangelio validas por ĉiuj! (Romanoj 1,1-17)

Mardo, 11.10.16, 10.00: La eterna Kreinto kaj la pekanta homo (Romanoj 1,18-32)
Mardo, 11.10.16, 19.30: Idolanoj kaj judoj kulpas antaŭ Dio (Romanoj 2)

Merkredo, 12.10.16, 10.00: La nura vojo por esti savita (Romanoj 3)
Merkredo, 12.10.16, 19.30: Abrahamo, la patro de la fido (Romanoj 4)

Ĵaŭdo, 13.10.16, 10.00: Kiamaniere akiri pacon kun Dio (Romanoj 5,1-11)
Ĵaŭdo, 13.10.16, 19.30: Adamo kaj Kristo (Romanoj 5,12-21)

Vendredo, 14.10.16, 10.00: La signifo de la bapto, peko kaj graco (Romanoj 6)
Vendredo, 14.10.16, 19.30: La mistero de la leĝo (Romanoj 7)

Sabato, 15.10.16, 10.00: La vivo en spirito (Romanoj 8,1-17)
Sabato, 15.10.16, 19.30: La nuna sufero k. la estonta gloro (Romanoj 8,18-27)

Dimanĉo, 16.10.16, 10.00: Nenio povas nin apartigiei de la amo Dia (Romanoj 8,28-39)
*Kontinuo en aŭtuno 2017 planata, se Dio volas kaj ni vivas.*

**Loko, aliĝo kaj jarprogramo:**
**Haus Sonnenblick**
**Poststr. 25, D-75385 Bad Teinach**
**Tel. 07053-92600,**
**Fax 07053-926099**
**Email:** **[HausSonnenblick@t-online.de](mailto:HausSonnenblick@t-online.de)**
**Homepage:** **[www.haus-sonnenblick.info](http://www.haus-sonnenblick.info)**



# En propra afero

Karaj amikoj,

ĉi tie ni volas elkore danki ĉiujn, kiuj por ni preĝas kaj nin helpas, daŭre servi al la SINJORO. Sen via fidelo tio ne estus ebla. Ĉar nin ĉiam denove atingas novaj informoj, ni atentigas ĉi tie pri tio:

1. Ĉiuj sendataj sumoj kun la dediĉo **„Der schmale Weg"** estas uzataj por la produktado kaj kolportado de nia gazeto.

2. La sendataj sumoj kun la dediĉo **„Gemeinde"** estas uzataj por la organizado kaj konstruado de la komunumoj; la sumoj kun la dediĉo **„Mission"** estas uzataj por la misiaj celoj (ekzemple por la produktado de la traktaĵoj).

3. La sendataj sumoj kun la dediĉo **„Gassmann"** estas uzataj por financi la monatan salajron de nia sekretario. La frato Lothar Gassmann dependas de tiuj donacoj, ja li aliajn fontojn ne havas – ankaŭ *ne* de la biblia komunumo Pforzheim. La tuta laboro en la biblia komunumo Pforzheim okazas *plene sensalajre* fare de pluraj gvidaj fratoj, kiel ankaŭ de kelkaj aliaj gefratoj ĉe laboro por infanoj, por junuloj, por la misia teamo ktp. Ni havas kiel komunumo neniun salajratan pastoron aŭ plendungiton. Ni tion mesaĝas, ĉar ĉiam denove miskomprenoj kaj novaj demandoj tiuteme aperas. Pluraj longjaraj donacantoj, kiuj aranĝis daŭromandaton, dum lasta tempo mortis, kaj tiel estiĝis financa truo. Ni estas tre dankemaj, se tiu aŭ tiu leganto tiun truon povas ŝtopi kaj tiel kunporti la daŭrigon de la laboro de frato Gassmann.

La kontonumeroj por Germanio, Aŭstrio kaj Svisio troviĝas sur la paĝo 2 de tiu ĉi gazeto. Ni estas elkore dankemaj tiel por unuopaj donacoj, kiel ankaŭ por la daŭraj mandatoj.

La SINJORO benu la donantojn kaj la donaĵojn!

En la amo de Jesuo kun vi ligata -

*La kristana komunuma servo, por:*

*Thomas Ebert, prezidanto*

Der schmale Weg Am Waldsaum 39, · 75175 Pforzheim,
Postvertriebsstück, DPAG, Entgelt bezahlt

# La plej alta senco de la arto

La plej alta senco de la arto
troviĝas jene – adoradi Dion,
anstataŭ la fum' de necerteco
kaj pseŭdonim' malhela
nomon de l' Kreinto
en helan lumon skribi –
tiel el la tia ĉi semaro
fruktoj de la vivo kreskos.

L. G.

**Christlicher Gemeinde-Dienst Pforzheim** (CGD) –
Verein zur Förderung christlicher Werke und Gemeinden